# ĈU ARMEO AŬ CIVILA, NEPERFORTA DEFENDO ?

La Juna Penso
F 47340 Laroque Timbaut
118B 1977 5 FF

BERGEON J-LUKO

BERGEON j-L

**esperanto**

**nun**

# ĈU ARMEO AŬ CIVILA NEPERFORTA DEFENDO ?

La Juna Penso
F 47340 Laroque Timbaut
118B 1977 5 FF

Subskribis la originalan, franclingvan dokumenton jena grupo da armeanoj kaj civiluloj :

Georges Baudonnel
Jean-François Besson
Jacques de Bollardière
Marc Bressou
Yvonne Labande
Lanza del Vasto
Jean Lasserre
Aimé Leaud
Olivier Maurel
Gérard Millischer
Roger Moreau
Albert Ratz
Françoise Thomazo
Jean Toulat

Originala titolo :

Armée ou défense civile non-violente ?
(Speciala numero de "Combat Non-Violent", Nº 59-60, marto 1975)

Esperantigis kaj eldonis : Pacista Frakcio de SAT.

---

## Averto al la leganto

Skribante tiun studon, la francaj verkintoj celis ĉefe konsciigi siajn samlandanojn pri la domaĝoj de ilia defendsistemo kaj proponi al ili alternativon.
En la unua parto de la broŝuro, ili resumas la kritikojn, kiujn oni povas fari kontraŭ la armeo. En la dua parto, ili demandas sin, ĉu perarmila defendo reale efikas. Tiu analizo koncernas unue la situacion en la nuntempa Francio. Sed la militigado bedaŭrinde ne estas monopolo de la franca ŝtato. Tial tiu analizo estas unu ekzemplo de ĝenerala fenomeno.
En la tria parto de sia studo, la verkintoj, per ekzemploj de faktaj agadoj el diversaj landoj (notinde kontraŭ naziaj agresantoj) montras, ke eblas alia defendsistemo : la neperforta defendo.
En sia konkludo, ili esprimas sian deziron, ke efektiv-

iĝu kunordigo kun la aliaj popoloj. Tial, konsiderante, ke Esperanto estas bonega ilo por ebligi la necesan debaton, mi, kun la helpo de pacistaj amikoj, verkis tiun esperantlingvan eldonon por miaj kamaradoj de SAT kaj por la tuta esperantistaro.

La tradukintino.

## Antaŭparolo

Ĉu oni ĝojas pro tio, ĉu oni bedaŭras tion, la konfido de la Francoj al ties defenda sistemo ŝajnas forte ŝancelita. Admiralo de Joybert, kiam li estis stabestro de la franca mararmeo, konfesis tion publike : "Estas nekontesteble, ke multaj Francoj, el ĉiuj aĝoj kaj situacioj, demandas sin pri la neceso de nacia defendo, kaj pli precize, de la Armitaj Fortoj". (1). Tiuj diroj estis konfirmataj en 1973 kaj 1974 far sinsekvo da manifestacioj, kiujn, pro ilia graveco, la francaj gazetaro kaj televido devis larĝe eĥi : traktorveturado al Parizo far la kamparanoj de Larzako, manifestacioj de la liceanoj kaj studentoj kontraŭ la forigo de la prokrastoj por la enregimentiĝo kaj kontraŭ la soldatservo, deklaracio de la eklezioj pri la armilkomerco (2), kampanjo por oponi al la nukleaj eksperimentoj, procesoj de obĵetantoj kaj oberifuzantoj, alvoko de la cent soldatservuloj, agitado en la kazernoj, manifestacio en Draguignan, ktp. Krome, ekstera evento, la ŝtatrenverso far la ĉiliaj militistoj, reviglígis la debaton pri la loko kaj rolo de la armeo en la nacio.

Se, kiel asertis la franca eksministro Michel Debré en la "Blanka Libro pri la nacia defendo", "kiaj ajn estas la manieroj de defendo, neniu politiko valoras sen nacia konsento", ŝajnas, ke la valoro mem de la franca defenda politiko foriĝis, kaj ke trudiĝas revizio, eble korŝira.

Estus tre danĝere, tamen, sin lasi al sendetala kontraŭmilitismo. Ĉar la nuntempa kontraŭmilitismo apogas sin - kiel oni vidos ĉi-poste - sur tro diversaj kaj tro moviĝemaj bazoj, por povi konsistigi agadprogramon.

Krome, la registaro, la militistaro kaj granda parto de la publika opinio prave asertas, ke popolo rajtas kaj devas defendi sian vivon kaj siajn rajtojn kontraŭ ekstera agreso. Nenia ekstera politiko, kiel ajn pacema, povas sola ŝirmi popolon kontraŭ okazeblo de agreso. Eĉ probablas

---

(1) "Le Monde", 1975.01.27
(2) Tiu teksto kaj aliaj episkopaj deklaracioj estas arigitaj en la dokumentaro (franclingva) : "Des évêques face au problème des armes", prezentita de pastro Toulat (ĉe "Le Centurion").

ke, en la mondo de superregadoj kaj perfortoj, kie ni vivas, popolo, kiu intencus faradi eksteran politikon vere justan kaj paceman, estus devigata pridiskutigi la internacian malordon, kaj per tio nepre turnus kontraŭ sin multajn malamikaĵojn far la profitantoj de tiu malordo (la multnaciaj societoj, interalie).

Alivorte, la pridiskutigado de la perarmila defendo (3) ne povas nek devas okazi sen la esplorado de alia defendformo. En tiun esploradon la verkintoj de la studo tie ĉi esperantigita celas enirigi la leganton.

Nu, ekde la finpretigo de la teknikoj de neperforta agado far Gandhi en Sudafriko kaj en Hindio, allumiĝis la ideo, ke tiujn teknikojn oni povus uzi kontraŭ alilanda invadanto. Tiun intuicion konfirmis la sukceso de kelkaj neperfortaj luktoj kontraŭ la nazia okupanto. En la skandinavaj kaj anglosaksaj landoj la "civila neperforta defendo" (anglalingve "strategy of civilian defence") jam estis temo de pluraj verkoj. En Francio tiu vojo restis neesplorita, krom kelkaj partaj studoj. La francaj verkintoj de tiu ĉi studo aldonas siar (4).

Ili plene konscias pri la limoj kaj nesufiĉoj de sia laboro. Funda verko pri neperforta defendo estas ankoraŭ skribenda kaj ili ege deziras, ke tia tasko estu entreprenata.

Tamen la publikigo de ilia studo ŝajnis al ili nepre necesa en momento, kiam tiom da Francoj demandas sin pri sia defendsistemo, kaj kiam esprimiĝas tiom da eraraj

-------

(3)Estu klare por la leganto, ke ni uzas la vorton "perarmila defendo" por signifi "defendo dotita per murdaj armiloj", male de neperforta defendo, kiu agadas ankaŭ per "armiloj", sed per personrespektemaj iloj.

(4) Francaj studoj pri neperforta defendo :
"Une nouvelle force de frappe" de Jo Pyronnet (ĉe Témoignage Chrétien). Ĉapitro pri tiu temo en "Les chrétiens et la violence" (Jean Lasserre), "L'Evangile de la non-violence" (Jean-Marie Muller), "La bombe ou la vie" (Jean Toulat). Krome, Olivier Maurel kaj la neperforta grupo de Toulon publikigis libreton "Défense nationale armée ou défense populaire non-violente".

komprenoj pri neperforta defendo. Ateste la artikolo "La violence et la force" (Perforto kaj forto) publikigita de generalo Beauvallet en "Forces Armées Françaises" en oktobro 1973. La verkinto konsideras neperforton "rifuzo sin defendi", sinteno, kies "malinstiga valoro kaj liberiga valoro estas preskaŭ neniaj", elekto, kiu, se ĝi ĝeneraliĝus, "riskus sekvigi malkreskon de la defenda spirito". Nu, unu el la bazoj de neperforto estas ĝuste la rifuzo kunlabori kun maljusto.

Same, Pierre Davezies, direktoro de la Universitata Centro de Militaj kaj Strategiaj Studoj de la universitato Parizo 1, similigas neperforton kun formo de "kolektiva abdiko" aŭ de "senmezura nekonscio" kaj nomas ĝin "pasiveco" aŭ "inhibicio" (°).

Ne plu eblis lasi sen respondo tiajn kontraŭsencojn pri neperforto.

La verkintoj, do, unue provis klarigi la ĉefajn kialojn de la konfidkrizo, kiu pridiskutigas la nuntempan defendsistemon. Ŝajnis al ili, ke tiu krizo havas kvar ĉefkialojn : politikan, ekonomian, ekologian kaj moralan. Sed tiuj kritikoj ofte koncernas nur la konsekvencojn de perarmila defendo kaj la nekonfesatajn funkciojn de la armeo. Ŝajnis al ili, ke estas ankaŭ nepre necese esplori de proksime la efikecon de perarmila defendo en ĝia oficiala funkcio : la defendo de la teritorio kaj de la landanaro. Ĉu la perarmila defendo vere plenumis tiun funkcion pasintece ? Ĉu ĝi povas plenumi ĝin nune kaj estontece ? Tio estas dubinda, kaj oni provas klarigi kial.

Ili prezentas poste tion, kio povus esti civila neperforta defendo, kaj la problemojn, kiujn okazigus ĝia starigado. Nome, la defendo de lando ne povas esti apartigata de ĝia politiko, de ĝia ekonomio, de ĝiaj sociaj strukturoj kaj tial ŝanĝado de la perarmila defendo ne eblus sen malfacilaĵoj. Sed veras ankaŭ la malo, kaj la ŝtatrenverso far la ĉiliaj militistoj kruele pruvis, ke la politikaj, ekonomiaj kaj sociaj problemoj ne povas trovi solvon aparte de la militaj problemoj.

Ŝajnas, fine, ke la konsciiĝo, kiu nuntempe okazas,

-------

(°) Revuo "Projet", novembro 1973.

politike al malcentrigado, ekonomie al memmastrumado, kaj ekologie al esplorado de "leĝeraj teknikoj", aŭ, laŭ la dirmaniero de Ivan Illich, de "kunviveblaj"iloj, perfekte samdirektas kun la esplorado de neperforta defendo. La komunaĵo de tiuj orientadoj estas la strebo redoni al la individuoj kaj al la lokaj komunumoj iniciatojn, respondecon kaj povon. Nu, la ekagilo de neperforto estas en ĉies koro, ĝia efikeco dependas de la solidaro de tiuj, kiuj uzas ĝin, kaj ĝiaj agrimedoj donas al individuoj kaj al lokaj komunumoj veran povon.

Tial, se estas dezirinde, ke ĝi estu legata de responsuloj politikaj, sindikataj, militistaj, religiaj, por ke ili demandu sin, sianivele, pri la civila defendo kaj pri la problemoj, kiujn tia defendo levas, tiu studo celas ankoraŭ pli tiujn, kiuj ajn ili estas, kiuj ekkonscias pri la minacoj pezantaj sur ni (kaj ĉefe pri tiuj rekte naskataj de la sistemoj de perarmila defendo). Ĉar ŝajnas finfine, ke per la bazo, per la premado kaj kreemo de la individuoj, de la grupoj kaj de la lokaj komunumoj, povos realiĝi iom post iom la transformon de la publika opinio, kiu ebligos veran ŝanĝiĝon de la perarmila defendo al civila neperforta defendo.

Ĉu necesas precizigi, ke tiu kritiko al la sistemo de perarmila defendo intencas respekti la personojn, kiuj responsas pri ĝi (la politikistoj) kaj kiuj realigas ĝin (la militistoj) kaj ke la verkintoj kaj esperantigintoj de tiu broŝuro deziras reale ekdialogi kun ili ?

# Pridiskutado de la nacia defendo

1. El politika vidpunkto :

Manifestiĝas en Francio, ĉefe ekde 1968, politika kontestado al la armeo. Plejofte formulas ĝin la ekstremmaldekstraj organizoj. Laŭ tiuj, la armeo estas klasa armeo servanta la potenculaton, kiu uzas ĝin samtempe enlande por enregimenti la junularon, rompi la strikojn, subpremi la popolajn movadojn, kaj ekstere, por defendi kaj disvolvi la kapitalistan imperiismon.

Tamen multaj estas tiuj, kiuj rifuzas tiun analizon kaj plu konsideras la armeon "armeo de la Respubliko je la servo de la Nacio", la ŝildo de la lando, kaj la soldatservon loko, kie realiĝas la kunfandiĝo de la sociaj klasoj, kaj kie enkorpiĝas la nacia solidareco.

Sed ne necesas aliĝi al ekstremmaldekstra organizo por konstati en Francio iujn faktojn :

- la regularo n-ro 59-147 de la 7a de januaro 1959, pri la ĝenerala organizado de la defendo, difinas ĝin kiel "konstantan staton, kiu antaŭvidas kaj ebligas mobilizadi kaj rekvizicii armeanojn kaj civilulojn, virojn kaj virinojn, sub unu sama aŭtoritato kaj kun la samaj devoj okaze de minaco". Nu, la signifo de la vorto "minaco" ne estas precizigita. Povas temi tiel pri enlanda minaco kiel pri ekstera minaco; nura striko povas esti konsiderata kiel enlanda minaco : tiel, en marto 1965, la ministoj de la Franca Karbominejaro (franclingve : "Charbonnages de France"), kiuj ekstrikis por nelimigita daŭro, estis kolektive rekviziciataj laŭ la regularo de 1959. Ili rifuzis obei la rekviziciordonon, konsiderante ĝin atenco kontraŭ la strikrajto. La registaro devis cedi kaj akcepti trakti, sed la regularo restadas kaj ĝi povas ĉiumomente aplikiĝi.

- la ŝtatsekretario pri nacia defendo mem deklaris, la

19an de januaro 1972 : "la operacia defendo de la teritorio (franclingve : "Défense Opérationnelle du Territoire, aŭ DOT) estas organizita por eviti ĉian reon de la okazaĵoj, kiuj ŝancelis Francion en majo 1968." Kiel rimarkigis la gazeto "Le Monde" de la 28a de januaro 1970, la fortoj de la DOT povus kunagi flanke-ĉe-flanke kun la fortoj de ordkonservado por haltigi enlandan renverson, kiu ekrealiĝus "en rilato aŭ sen rilato kun agreso ĉe la landlimoj".

Ankoraŭ pli klare, en artikolo de "Forces Armées Françaises" (5), generalo Beauvallet asertis : "Oni ja devas ekkonsideri la partoprenon de la armitaj fortoj aliaj ol la ĝendarmaro en tiu tasko (la konservado de la ordo). La generalo pravigis tiun partoprenon, memorigante, ke "tion oni faras en ĉiuj landoj de la mondo" kaj ke "la leĝaj tekstoj, kiuj antaŭvidas tiun partoprenon, estas precizaj kaj donas seriozajn garantiojn kontraŭ ĉia misuzo". Sed oni scias, kio okazas pri la leĝaj tekstoj okaze de krizo; kaj pri la ekzemplo de la aliaj landoj de la mondo, oni malbone vidas, kiel ĝi estas pravigo. Oni scias, ke la sekcioj de informado de la franca armeo ne hezitas arigi, sub la signifoplena nomo "enlanda kontraŭanto" ne nur la kontraŭmilitismajn movadojn, sed ankaŭ la maldekstrajn partiojn kaj la sindikatojn, kaj tio povas naski kelkajn dubojn pri la aserto de generalo François Maurin, laŭ kiu "la armeo ne servas la kapitalismon". (6)

Ĉu necesas memorigi, ke la revolucio de 1789, kiu naskis la Francan Respublikon, origine estis karakteriza "enlanda renverso" ?

- la sinturno al la armeo okaze de striko, kiel tiuj de la rubujistoj, de la parizaj kolektivaj transportoj, de la ĉielkomutistoj, aŭ de la poŝtistoj certe kontentigas parton de la landanaro; tio ne malpliigas la fakton, ke ĝi estas atenco kontraŭ la strikrajto.

- en majo 1968, la ĉeesto de kirasveturiloj ĉirkaŭ Parizo kaj la vizito de generalo de Gaulle al generalo Massu por

-------

(5) januaro 1974.
(6) Le Monde, 1973/10/17.

konstati, ĉu la armeo estas preta subteni la potencularon, montras, ke la sinturno al la armeo kiel forto por enlanda subpremo estas neniel malakceptata.

- tion videbligas ankaŭ la temoj de freŝdataj militaj manovroj : "la armeo intermetas sin okfoje por restarigi la potencon" (oktobro '70) kaj "la popolaj ribelegoj en industriaj centroj" (oktobro '71).

- fine, ne eblas nei, ke unu el la ĉefaj funkcioj de la franca armeo, de preskaŭ 150 jaroj kaj ankoraŭ ĵuse en Ĉadio, Malagasio kaj Ĝibutio, estis tiu de intervenforto en la transmaraj teritorioj, rolo, kiu neniel estas nacidefenda.

Ĉiuj tiuj faktoj montras, ke la oficiala kaj ĉefa tasko de la militaparato, defendi la teritorion kaj la landanaron, akompaniĝas, ofte kontraŭ la deziro de la armeanoj mem, per kvazaŭ kaŝitaj taskoj, kiuj ankaŭ same gravas el la vidpunkto de la potencularo (7).

La puĉo de Alĝero kaj la minaco de malsuprenirado de la paraŝutistoj sur la metropolon montras, ke Francio ne estas nepre antaŭgardata kontraŭ krizoj : la lastatempaj konfliktoj en Pakistano kaj Biafrio, la multaj ŝtatrenversoj, kiujn spertis Sudameriko, kaj ĉefe tiu de Ĉilio, kies armeo estis fame konata pro sia lojaleco, la ŝtatrenversoj, kiuj alpotencigis Francon kaj la grekajn kolonelojn, ebligas konstati evidente, ke la armeo estas tre ofte uzata de la registaroj kiel forto de enlanda subpremado, kiam ĝi ne anstataŭas mem la registaron.

Do, ĉu el la vidpunkto de la landanaro, ĉu el la vidpunkto de la potenculαro, la armeo, en la politika sfero, estas nur trompa sekurilo.

Tamen tiuj, kiuj plej insistas pri tiu kritiko ne ĉiam kontestas la principon de perarmila defendo. Ili plej ofte aprobas popolan perarmilan defendon, kelkfoje eĉ nuklean defendon, kies malavantaĝojn ni vidos poste.

-------

(7) Pri la armeizado de Francio, legu : "La France militarisée" de O.Bachet, C.Pons kaj M.Tachon (ĉe Editions du Cerf, kolekto Objectifs, 1974).

2. El ekonomia vidpunkto :

Multe pli ĝenerala kaj populara estas la kritiko al la armeo pro ekonomia kialo. Armeo, kaj ĉefe moderna armeo, kostas multe, tio estas nekontestebla. En ĉiuj landoj de la mondo, la kreditoj destinataj al la armeoj videblas kiel sufoka pezâjo, ĉefe se oni komparas tiujn mortbudĝetojn kun la vivbudĝetoj : sano, handikapuloj, esplorado, instruado, ekologio, ktp. Laŭ freŝdata studo de UNESKO, ĉiu soldato kostas proks. 7800 dolarojn jare, t.e. ke soldato kostas tiom, kiom 78 lernantaj infanoj. En Francio, 17 % de la budĝeto estas destinataj al la Nacia Defendo. Krome, tiuj 17 % estas nur la oficiala procento, kiun praktike la tutâjo de la militaj elspezoj superas. En kelkaj landoj, tiuj budĝetoj atingas frenezajn procentojn : 20 % en Hindio, 32 % en Saŭdarabio, 47% en Irano, 50 % en Izraelio, ktp.

Krome, la modernaj armilaroj, rapide eksvalidaj, devas esti ofte renovigataj : "armilo ne povas resti rigida; ĝi devas konstante restadi ĉe la optimuma nivelo, kiun ebligas la tekniko", deklaris, en oktobro 1972, generalo Guernon, direktoro de la Centro de Eksperimentado en Pacifiko. Pli ĵuse, generalo Martin, eksstabestro de la franca aerarmeo, skribis (8): "Tiuj tipoj de armilaro nuklea kaj elektrona pelas nin en trudan logikon : la senfinan teknologian lukton de la pacotempo."

Tamen la financa argumento ne sufiĉas, se nura, por kontesti la perarmilan defendon; ĉar se ĝin oni juĝas efika, oni ne povas serioze konvinki iun senarmiliĝi pro la nura kialo, ke ĝi kostas multe. La aprobantoj al la milita defendo tro facile povas apliki al ĝi la principon, laŭ kiu "la asekuro ŝajnas multekosta nur antaŭ la akcidento."

Aliflanke, gravas ekkonscii, ke estas kontraŭdire kritiki samtempe la gravecon de la milita budĝeto kaj la vendadon de armiloj al aliaj landoj, sen kontesti la militan defendon mem. La modernaj armiloj kostas tiom, ke unu lando ne povas arigi por si sufiĉan sendependan armilaron sen vendi parton al aliaj landoj, por ke la produktado estu profitdona. Tial oni ne prisilentu, ke, se oni rezignos - kiel tio dezirendas - vendi armilojn al aliaj landoj, oni devos ŝarĝi sin per plikostiĝo de la

(8) Le Monde, 1974/09/17.

milita budĝeto.

3. El ekologia vidpunkto :

Moderna armeo signifas modernajn armilojn. Modernaj armiloj signifas kemiajn kaj nukleajn armilojn (multaj ŝtatoj ŝajne provizore rezignis la bakteriajn armilojn, eble ĉefe pro la malfacileco kontroli iliajn konsekvencojn, sed tiu rezigno estas nek definitiva, nek,sendube, ĉiea).

Jam antaŭ ol servi dum milittempo, tiuj armiloj estas eksperimentataj dum pacotempo kaj estas per tio vera danĝero por la ĉirkaŭaĵo. Oni ankoraŭ tro malofte scias, ke dum la granda serio da nukleaj eksperimentoj far Usono kaj Sovetio en la jaroj 50-aj kaj komence de la jaroj 60-aj, la kvanto da radioaktiva stroncio 90 en la lakto pliiĝis en Francio, de proksimume 3 pikokurioj po litro en 1955 ĝis 8 pikokurioj en 1957, 9 ĝis 13 pikokurioj en 1958 kaj, en novembro 1964, ĝis 30 kaj foje ĝis 50 kaj 100 pikokurioj. Nu, la alarm-enteno estis fiksita je 10 pikokurioj po gramo da kalcio, kaj la lakto entenas de 1 ĝis 1,5 gramon da kalcio po litro. En Britio, la registaro estis decidonta malpermesi la disdonadon de freŝa lakto al la infanoj.

Ni bone scias, ke ne ĉiuj spertuloj estas samopiniaj, kaj ke kelkaj asertas, ke la nukleaj eksperimentoj estas sendanĝeraj. Sed kial fidi ilian optimismon pli ol la opinion de biologo kiel Jean Rostand, kiu deklaras mem kun multaj aliaj sciencistoj, ke "neniu nuklea eksplodo povas esti juĝata sendanĝera" ?

Ni havas des pli multajn kialojn por malfidi, ke la opinio de la spertuloj ŝajne strange malsimiliĝas laŭ la politikaj cirkonstancoj. Maltrankvilige estas kompari la asertojn de du usonaj prezidentoj, kiuj, kun nur okjara intertempo, kaj ŝajne surbaze de la deklaroj de spertuloj, povis diri : "La daŭrigo de la nuntempa ritmo de la eksperimentoj de A-bombo, efektivigataj sub la kontrolo de sciencaj eminentuloj plej seriozaj kaj kompetentaj... ne endanĝerigas la sanon de la homaro." (Prezidento Eisenhower, oktobro 1956). "La traktato pri malpermeso de la nukleaj eksperimentoj haltigis la regulan kaj minacan pliiĝadon de la radioaktivaj refalaĵoj. La mortigaj

produktoj de la atomeksplodiloj venenas nian grundon kaj nian nutraĵon, la lakton, kiun trinkas niaj infanoj kaj la aeron, kiun ni ĉiuj spiras. Radioaktivaj sedimentoj formiĝis, en ĉiam kreskantaj kvantoj, en la dentoj kaj la ostoj de la junaj usonanoj. La radioaktivaj venenoj ekminacis la sekurecon de la homo en la tuta mondo kaj estis grandiĝanta danĝero por la sano de ĉiu naskota infano" (Prezidento Johnson, oktobro 1964) (9).

El tiuj du deklaroj kiu estis vera ?

Ne estas pli trankviliga la decido de la franca registaro entrepreni la realigadon de subteraj nukleaj eksperimentoj. La reprezentanto de Francio ĉe UNO, sinjoro Guiraingaud, deklaris mem, la 12an de novembro 1973, ke la strukturoj de la ter-profundaĵoj estas ankoraŭ pli malbone konataj ol tiuj de la atmosfero, kio eblígas ĉiajn dubojn pri la gas-ellasoj, akompanantaj la subterajn eksperimentojn. (10)

Ne eblas nei, ke Francio, daŭrigante siajn nukleajn provojn en Pacifiko, je nur cento da kilometroj de loĝataj atoloj, kies loĝantaro konsumas grandan kvanton da fiŝoj, prenas responson, kiun ĝi reale ne povas mezuri.

Koncerne la klasikan militon, la formoj, kiujn ĝi prenis, ekzemple en Vjetnamio, estas ege malkvietiga el ekologia vidpunkto. La nacia akademio de usonaj sciencoj en raporto taksas, ke necesos eble jarcento por kompensi la damaĝojn, kiujn estigis en Sud-Vjetnamio la uzado de kemiaj produktoj... La herbdetruiloj, kiujn uzis dum 10 jaroj la Usonanoj, kaŭzis gravajn damaĝojn al la enlandaj arbaroj, detruis 36 % el la marbordaj arbaroj kaj tre probable mortigis infanojn en montaraj regionoj. Dum 10 jaroj konsumiĝis la ekvivalento de 3 kilogramoj da kemiaj produktoj por ĉiu loĝanto; pli ol 2 200 000 hektaroj (sepono de la lando) estis tiel "traktataj" (11). Aliflanke, oni scias, ke la usonanoj uzis dum pluraj ja-

-------

(9) Citaĵoj ĉerpitaj el "Quelle terre laisserons-nous à nos enfants?" , de Barry Commoner, Le Seuil, 1969. (anglalingve : Science and survival).
(10) Le Monde, 1973/11/14.
(11) Le Monde, 1974/03/29.

roj en Vjetnamio la senfoliigilon 2-4-5-T, kiu kaŭzis kancerojn ĉe la musoj kaj malnormalajn evoluadojn ĉe bestfetoj. 13 milionoj da litroj da tiu senfoliigilo estis verŝitaj sur preskaŭ 5 milionojn da hektaroj en Vjetnamio. (12)

3. El morala kaj religia vidpunkto :

La sinturno al perforto kaj la leĝaro pri hommortigo en milittempo tiel kontraŭdiras la moralon kutime akceptatan en pacotempo, ke oni povus supozi, ke la perarmila defendo estos ĉie kontestata far la konsciencoj kaj la eklezioj.

Nu, tiu kolektiva reago ne okazis.

Kiel ajn kruela ĝi estas, la milito ŝajne estas konsiderata kiel malpli granda malbono kompare al la malbonoj, kiujn ĝi supoze riparas.

Oni ĝenerale opinias, ke la konsekvencoj de invado estas pli malbonaj ol milito. La radikalaj pacistoj formas en ĉiuj landoj malplimulton, kies protestoj frakasiĝas kontraŭ amasa aliĝo al la principo "la celo pravigas la rimedojn". Milito estas certe terura, kaj teruraj la kruelegaĵoj, kiujn ĝi estigas, sed oni ja devas defendi sin : tia estas ŝajne la plej ofta opinio.

Tamen, inter la nuntempaj ateistaj pensistoj, ne mankas voĉoj, kiuj leviĝis por denunci la militan agadon malmorala,pereiga kontraŭ la homara feliĉo, aŭ por montri la vojojn de neperforto plej bone adaptitaj por savi mondon "atingintan la randon de la termonuklea abismo"; ekzemple Alain, Jean Giono, Bertrand Russell, Albert Camus, Jean Rostand... (o)

Koncerne la kristanojn, kvankam, en la plimultaj kazoj en la tri unuaj jarcentoj de la eklezio, ili rifuzis la armilservon, foje koste de siaj vivoj, ilia aliĝo al la konstantena ŝtato ekde la kvara jarcento igis ankaŭ ilin

-------

(12) Le Monde, 1970/04/19.

(o)Noto de la trad.: la verkintoj memdire elektis la nomojn plej konatajn de la francaj legantoj. Esperantistoj trovos citaĵojn el multaj eminentuloj en la broŝuro : "Por la paco, kontraŭ la milito" (ĉe La Juna Penso).

konsideri militon "malpli granda malbono", kiam temas pri rezistado kontraŭ agreso far alilandanoj. Tiu principo inspiris la plej grandan parton de la kristanaro ĝis hodiaŭ. Ĝi tre ofte finvenis al vera sanktigado de la armeo kaj de la milito. Parolante pri la kristanaj soldatoj kiel pri "kavaliroj de Kristo", sankta Bernardo, ekzemple, asertas, en la dekdua jarcento, ke ili estas "la ministroj de la Dia justico, komisiitaj persekuti la malbonulojn kaj glori la justulojn... la morto, kiun ili donas, estas la profito de Kristo" (13).

Tamen, dum la nuntempa epoko, la sinteno de la katolika eklezio notinde ŝanĝiĝis. La koncilio Vatikano II invitas la kristanojn konsideri la militon per "tute nova spirito" kaj liberiĝi el ĝia "antikva servutigo".
Ekde tiam la deklaroj de la papo kaj de la episkopoj multiĝis en tiu direkto : vetkurado al armilaroj, nuklea armilaro, armilvendadoj, plivastigado de milit-kampadejoj estis plurfoje denuncitaj far la episkopoj, same kiel, cetere, far la protestantaj eklezioj, kiuj ĉiam manifestis rilate al la armeo pli grandan sendependecon.(o)

Oni scias kian gradon de streĉiteco atingis la konflikto inter la Eklezio kaj la Armeo dum la franca kampanjo de nukleaj eksperimentoj en 1973. Jam en oktobro 1972 en la 1a numero de "Revue des Forces Armées", la registaro kredis utile memorigi al la kristanoj, per la skribilo de generalo Beauvallet, pri ilia devo partopreni en la milita defendo de sia lando.
La plej granda novaĵo en la sinteno de la eklezioj estas, ke ili ne kontentiĝas per konscienc-obĵeto, kaj manifestas ĉiam pli da intereso por neperforta defendo.

Vatikano II jam agnoskis : "ni povas nur laŭdi tiujn, kiuj, rezignante perfortan agadon por savi siajn rajtojn, turnas sin al defendrimedoj, kiuj, cetere, estas uzeblaj eĉ de la plej malfortaj, kondiĉe ke tion oni faru sen malutili al la rajtoj kaj devoj de la aliuloj aŭ de la komunumo" (Gaudiam et spes, ĉapitro V). En majo 1973, la "Noto de pripenso de la eklezioj pri armilkomerco" invitis la kristanojn serioze konsideri tiujn, kiuj "proponas sekurigi la nacian komunumon per sinturno al neper-

-------

(13)Sankta Bernardo : "Laŭdo al la nova milito".
(o)Noto de la trad.:tio estas nekontestebla en Francio.

forto", kaj la sinodo de la episkopoj en Romo, 1971, petis, "ke oni akcelu la neperfortan agadon kaj ke ĉiu nacio leĝe agnosku la prokonsciencan militrifuzon". Same, la letero de kardinalo Roy al Paŭlo la VI-a okaze de la deka datreveno de Pacem in Terris, asertas "malakordrajton" aŭ "malakordcivitismon", kiu, kiam ĝi malvolas korpajn perfortojn, alprenas, almenaŭ en kelkaj kazoj, la nomon neperforto. (14)

°°°

Tiel la nuna pridiskutado de la nacia defendo baziĝas sur tre malsamaj analizoj, kiuj devenas de diversaj medioj. La organizoj, kiuj kritikas la politikan rolon de la armeo, ofte rifuzas juĝi la uzadon de perforto el moralaj kaj religiaj kriterioj. Male, tiuj, kiuj turnas sin al tiuj kriterioj, ofte emas suspekti sub la politikaj analizoj, partianajn intencojn. Rezultas, ke la sinteno de la publika opinio rilate la armeon, kvankam ĝi estas sufiĉe kritikema por naski fidkrizon kaj konfuzon en la mensoj - krizon kaj konfuzon probablege neinversigeblajn - ne estas sufiĉe kohera por naski kreeman viglecon kapablan sukcesigi anstataŭan solvon.

-------

(14)Necesus sendube almeti tien ĉi pridiskutadon de la armeo el psikologia vidpunkto, kion ni povas nur skizi. La verkoj de Hannah Arendt (Procès à Jérusalem : essai sur la banalité du mal, ĉe Gallimard), de la brita psikanalizisto R.E.Money-Kirle (Psychanalyse et politique, eldonota ĉe Editions de l'Age d'homme) kaj ĉefe de la usona psikologo Stanley Milgram (Soumission à l'autorité, ĉe Calmann-Lévy) montris laŭ maniero malfacile refutebla, ke la profunda kialo de la plej kruelaj kondutoj estas multe malpli la sadismo de kelkaj individuoj, ol la kolektiva obeemo al la estraro. Tiu ideo, kiun konfirmas eksperimentoj faritaj ĉe centoj da individuoj el ĉiuj sociaj kategorioj, devus pensigi al ni, ke estas absurde pretendi lukti kontraŭ la agresado de totalisma ŝtato per sistemo de milita defendo tute bazita sur la obeemo al la hierarkia estraro. Ĉar, kreskigante tiun, oni nur pliprobabligas la venon de tio, kontraŭ kio oni volis lukti, t.e. de sistemo bazita sur la torturo kaj la teroro. Male, la disvolvado de la praktiko de civila malobeado, unu el la bazaj teknikoj de la neperforta agado, perspektivas formadi individuojn pli liberajn

Tial ŝajnas necese pluigi la analizon de la efikeco de perarmila defendo. Ĉu tiu, kiaj ajn estas la formoj, kiujn ĝi alprenas, povas esti konsiderata efika defendrimedo ?

Se la respondo estas jesa kaj se neniu alia defendmaniero estas tiel efika, tiam, ĉar la risko de invado ne povas esti prisilentata, kiu ajn estas la establita politika reĝimo, povos aperi logike konservi perarmilan defendon. Kelkaj simple proponos taŭgaranĝi ĝin, ekzemple formante popolajn milicojn, por eviti kiel eble plej la politikajn, ekonomiajn, ekologiajn kaj moralajn malavantaĝojn, kiujn ĝi nuntempe prezentas.

Sed se perarmila defendo ne estas reale efika rimedo por defendi landanarojn kaj teritoriojn, kaj, ĉefe, se ekzistas aliaj defendmetodoj, kiuj ebligus kontraŭstari la riskon de invado, tiam la progresivan anstataŭigadon de la perarmila defendo per novaj defendmetodoj oni devas ekzameni.

Oni konstatu, kiom decidiga povas esti la respondo al la demando pri efikeco de perarmila defendo.

-------

(14)daŭrigo -
rilate al ĉia aŭtoritato, pli responsajn kaj do pli kapablajn malobei ordonojn malhumanajn kaj malhelpi la starigon de totalisma diktaturo.
Noto de la trad: La verkoj, kies francaj tradukoj estas menciitaj estas : ARENDT(Hannah)(Mrs Heinrich Blücher): - Eichmann in Jerusalem : a report on the banality of evil. - Viking,1965. MILGRAM(Stanley): Obedience to authority : an experimental view. - Harper,1974. Kaj verko de Money-Kirle pri psikanalizo kaj politiko, kies referencojn mi ne trovis.

# Ĉu perarmila defendo estas efika?

"Certigi la sekurecon kaj la integrecon de la teritorio kaj la vivon de la landanaro", jen estas la celo de la defendo laŭ la franca regularo de la 7a de januaro 1959. Ĉu tiun taskon la perarmila defendo plenumis pasintece ? Ĉu ĝi povas realigi ĝin nuntempe ?

1. La tradicia milita defendo :

Ekde la komenco de la 19a jarcento, la historio prezentas impresan serion da fiaskoj de la milita defendo :

En Francio, kvin agresoj : 1814, 1815, 1870, 1914, 1940, rezultigis kvar nediskuteblajn malsukcesojn : 1814 kaj 1815 (malgraŭ la milita genio de Napoleono), 1870, 1940.

En tiuj kvar okazoj, post la malvenko de la armeoj, la tuta loĝantaro de Francio estis fordonata, sen iu ajn defendo, al la invadaj trupoj. En la milito de 1939-1945, nur fine de kvar jaroj povis alilanda kontraŭofensivo venki la invadintojn, koste de egaj detruoj kaj de bilanco kun pli ol duonmiliono da mortintoj.

La nura pridubebla kazo dum tiu periodo, tiu de la milito de 1914-18, montriĝas post analizo kiel kvina malsukceso. Certe, la fronto estis praktike blokata dum pli ol kvar jaroj per rapidpafaj armiloj. Sed, el la nura vidpunkto de la milita tekniko, tio, kio tiam okazis, ne povos reokazi. La kirasveturiloj, kiuj malblokis la fronton en 1918, la aviadilaro, la nukleaj armiloj ŝanĝegis la kondiĉojn de la milito kaj igas hodiaŭ nekonceptebla tian militan rezistadon. Kaj necesis la alilanda interveno, la kuna ofensivo de la armeoj usona kaj brita, por savi situacion, kiu, laŭ la belga generalo E. Wanty (15), "fariĝis malkvietiga kaj eĉ ne ebligis grandan esperon". Krome, kaj

---

(15)"L'art de la guerre" (ĉe Marabout), volumo 2, paĝo 237.

ĉefe, ĉu kun 1 390 000 mortintoj kaj 740 000 invalidoj (kvarono el la mobilizintaro, dudekono el la franca loĝantaro) la francoj povas serioze opinii, ke ili estis, dum tiu kvarjara milito, efike protektataj ? La "Venko" de 1914-18 kostis al Francio pli da homaj vivoj ol la tutaĵo de ĝiaj kvar malvenkoj ekde 1800.

Se oni almetas al tiuj malsukcesoj de ilia perarmila defendo (kvin, inter kiuj 4 nediskuteblaj) la fiaskojn spertitajn en Hindoĉinio kaj Alĝerio, oni rajtas demandi sin, ĉu la konfido de multaj francoj al tia defendo ne aspektas kolektiva iluzio.

Sed Francio ne havas la privilegion de tiuj militaj malvenkoj, kiujn ia propagando tro ofte emas klarigi per laŭdira "pacismo" de la francoj, kiuj neniam pensus pri sufiĉa armado. Fakte, kaj tio estas baza, la sama fenomeno okazis en ĉiuj landoj, kaj la okazoj, kiam la armeo de nacio efektive atakata povis protekti la integrecon de la teritorio kaj la vivon de la landanaro sen ofensivi mem prevente, ŝajnas malofteg̃aj kaj malbone pravigas ĉiujn porarmilajn elspezojn, kiujn ni ofte kredas necesaj.

Ne konvinkas multe la ekzemploj de perarmila defendo, kiujn oni ofte citas. Certe, Britio ne estis invadita en 1940, sed Hitler neniam vere provis tian operacion. Kaj sendube savis Sovetion malpli la Ruĝa Armeo, ol la rusa vintro kaj la misproporcio de la germana strebo, dispartigita sur tro da frontoj. Aliflanke, oni tro ofte forgesas tion, la Sovetianoj devis forlasi al la nazioj, dum preskaŭ tri jaroj, teritorion grandan kiel trioblo de la surfaco de Francio, kaj kies loĝantaro trovis sin fordonita sendefende al la invadantaro. Oni forgesas ankaŭ la vastecon de Sovetio, vera kontinento, kvardekoblo de Francio, kiu ebligis al la Sovetianoj retiriĝi milojn da kilometroj antaŭ la malamikaro. Fine, la milito kostis al la soveta popolo 20 milionojn da mortintoj, t.e. dektrionon el la sovetianaro. Ĉu la perarmila defendo efektive protektis la landanaron ?

La batalo en la Korala Maro (4an ĝis 8a de majo 1941), kiun oni kutime konsideras kiel la unuan haltigon al la japana antaŭenirado, okazis je 6000 kilometroj for de Japanio. Ĝis tiam nenio povis haltigi la ofensivon de la Japanoj, kaj la invaditaj teritorioj estis liberigitaj nur per la usona ofensivo, tri jarojn poste.

Koncerne Nordvjetnamion, se la Usonanoj suferigis al ĝi terurajn bombadojn, ili ne entreprenis ĝian invadon; kaj nek la norda armeo, nek la suda, plifortigata de la Usonanoj, efektive protektis la civilajn loĝantarojn, al kiuj estis trudataj terura suferado kaj ega mizero. Krome, tiu Vjetnama milito estis katastrofo ekologia por granda parto de la lando.

Simpla estas la klarigo pri tiu konstanta nekapableco de la armeo protekti la nacian teritorion kaj la landanaron. Ĉiam, kiam tradicia armeo kontentiĝas per defendo, ĝi estas praktike kondamnita al malvenko; ĝenerale la agresanto havas la avantaĝon, ĉar li elektas la terenon kaj la momenton de la atako. Male, defensiva armeo estas handikapata : unuflanke, ĝi batalas sur propra teritorio, kie ĝi ne povas sen skrupuloj uzi ĉiujn detruajn rimedojn, kiujn ĝi disponas, aliflanke, la menso de la defensivaj soldatoj, kiuj maltrankviliĝas pri la sorto de siaj familioj, kiujn ili scias en danĝero, estas nepre malpli favora; la tento forkuri el la batalo - nenia ĉe la invadantoj, estas foje tre granda ĉe la defensivuloj. Ni aldonu, ke la tekniko de la ofensivaj armiloj ĉiam pli antaŭas tiun de la defensivaj armiloj.

Pro ĉiuj ĉi kialoj, la spado ĝenerale superfortas la ŝildon.

Tiun tezon nur konfirmas la fakto, ke Francio estis dufoje liberigita dank'al la helpo de aliancaj armeoj. Britoj kaj Usonanoj atakis la germanajn trupojn sur la franca teritorio. Ĉi-lastaj, trudite al defensivo, devis cedi, malgraŭ la potenco de la aranĝoj lokitaj ĉe la Manika Maro kaj Atlantiko.

Alivorte, la logiko de la sistemo de milita defendo estas tia, ke lando, kiu volas sin defendi efike per armiloj, devas trakonduki politikon agreseman kaj imperiisman, por ĉiam ĝui la antaŭecon de la ofensivo. Absurda logiko, kiu neeviteble kondukas al la milito kaj, post pli malpli longa tempo, al la malvenko antaŭ nova agresanto pli forta kaj pli bone armita. Germanio spertis tion per la milito de 1939-1945 : 5 milionoj da mortintoj sur teritorio ruinigita kaj dividita al du ŝtatoj.

La milito de Jom Kipur nur ŝajne kontraŭas tiun logikon.

La siriaj kaj egiptaj atakoj certe estis forpelitaj de la izraelianoj. Sed la kontraŭofensivoj izraelianaj okazis en la vastaj teritorioj siria kaj egipta de Golano kaj Sinajo, kiujn la izraelianoj antaŭe okupadis en 1967 per milita atako, kaj kiuj utilis por ili kiel bufra teritorio. Ludis do la sama regulo. La izraelianoj povis sin defendi efike per armiloj (kaj je kia prezo !) , nur alprenante la pozicion de agresanto, per kiu ili kondamnas sin al senĉesa militstato. Ili riskas, aŭ trovi sin iam kontraŭstarantaj araban militkoalicion reale frakasan, aŭ helpi la komencon de monda konflikto, kies konsekvencojn neniu povas antaŭvidi.

La logiko de la milita defendo ne povas esti paca logiko. Krome, ŝajnas hodiaŭ certe, ke la Egiptoj ne volis ekspluati sian avantaĝon. "Vere, deklaris la izraela generalo Matitiahu Peled, nenio estus povinta malhelpi la egiptan armeon, se ĝi estus peninta por tio, atingi dum la unuaj tagoj de la milito, la intermontojn de Mitla kaj Gidi en Sinajo" (Le Monde, 1974/01/23).

Iuj opinias, ke la ludo de la aliancoj povus restarigi la situacion favore al la atakitaj landoj. Tio ŝajnas nuntempe la doktrino de la franca stabo, kiu, fine de 1972, proponis kiel manovran temon al rezervaj oficiroj : "Tri tagojn post la tago de la invado de Francio tra la orienta flanko, la franca armeo makise batalas en Pireneoj kaj en la regiono de Marsejlo, kaj efektiviĝas embuskojn en la regiono de Puatiero (Poitiers). Oni atendas la kontraŭatakon usonan tra Irano".

Aserti, ke tia strategio povus restarigi la ekvilibron siafavore, estas forgesi la taskon de la perarmila defendo de Francio, tia, kia ĝi estas oficiale difinita. Protektado de la teritorio : oni vidas, kia ĝi estus tri tagojn post la komenco de la invado, almenaŭ koncerne la parton de la teritorio situanta inter Marsejlo, Puatiero, Lillo kaj Strasburgo ! Protektado de la landanaro : oni imagas, kiel ĝi estus certigata dum la prokrastigaj bataloj, dum la okupado kaj dum la hipoteza kontraŭofensivo de la aliancanoj !

La sistemo de perarmila defendo tradicia ŝajnas ne nur netaŭga por protekti la teritorion kaj la landanaron, sed,

fakto ankoraŭ pli grava, ĝi plimultigas la riskojn de milito. Ĉar, por certigi sian armean sendependecon, nacio devas laŭeble produkti la propran armilaron. Nu, la modernaj armiloj multege kostas kaj ilia produktado estas profitdona, nur kondiĉe ke oni vendu grandan parton al aliaj landoj, kio sekvigas plimultiĝon de la konfliktoj, ilian potencan krudecon kaj ilian daŭron.(16)

Alivorte, la logiko de milita defendo akcelas la vetkuradon al armiloj, do pliprobabligas militojn kaj invadojn, kontraŭ kiuj ĝi poste ne kapablas protekti la landanaron.

2. La nuklea defendo :

Grandparte la ekkonsciiĝo pri la neefikeco de la tradicia milita defendo instigis la francan registaron doti la landon per nuklea armilaro.
Ĉu la landanaro estas per tio pli bone protektata ?
Pri tio oni povas serioze dubi.

Unuflanke la nuklea defendo alportas kun si novan danĝeron, totalan danĝeron, aliflanke ĝi plimultigas, en la estonteco, la riskojn de milito.

a) La baza principo de tiu armilaro estas, ke ĉi-lastan oni faris ne por uzi ĝin, sed nur por malkonsili al la malamiko ataki la landanaron aŭ entrepreni kontraŭ la nacia teritorio agadon, kiun li pagos je prezo grandega, senproporcia kun la celo de la konflikto. Sed la veto, kiun faras tiuj, kiuj elektas tiun defendsistemon, kuŝas sur neniu certaĵo.
La relativa paco, kiu regas depost 1945 inter Usono kaj Sovetio (17) nenion pruvas por la estonteco. Ankaŭ

-------

(16)Pri la vendado de armiloj far Francio, legu : "La France trafiquant d'armes" (ĉe Maspero, dua eldono, 1974)
(17)Ambaŭ potencoj alfrontis unu la alian per intermetitaj popoloj. Georges Thayer (en "Les Marchands de guerre" ĉe Julliard) nombras, ekde 1945, pli ol 300 perarmilajn konfliktojn, inter kiuj 45 gravajn militojn. La "nuklea paco" estas fakte senĉesa monda milito, sed kies bataloj okazas sur limigitaj, konstante moviĝantaj batalkampoj. Fakte, la monda milito ne ĉesis post 1945.

inter 1918 kaj septembro 1939, komenciĝis neniu milito, kaj post la granda buĉado de 14-18 oni povis pensi, kiel ni mem pensas hodiaŭ post dua buĉadego, ke la ŝtatestroj fine komprenis. La sekvon oni konas.

Sinjoro Messmer mem, kiam li estis ministro de la franca nacia defendo, konfesis, ke la defendo de Francio kuŝas "sur aksiomo laŭdifine nedemonstrebla". Nu, tio, kion la landanaro estas trudata veti, estas ĝia ekzisto kaj tiu de ĝiaj infanoj. Ĉar, se la veto estus perdita, kaj se okazus atako spite la bombon, tuta lando estus, laŭ la dirmaniero de sinjoro Sanguinetti, "forstrekita el la mapo de la tero".

Koncerne la teorion de la "fleksebla respondo", laŭ kiu la taktikaj nukleaj armiloj ("etaj" bomboj tiom potencaj kiom tiu de Hiroŝima) ebligus nuanci la subitecon kaj definitivecon de la nuklea enbataliĝo, ĝi ŝajnas, - kiam oni pensas pri tio, kio estas la reala etoso en la komenco de la konflikto -, aparteni al salona strategio. Grupo da kristanaj oficiroj, kiuj publikigis lastatempe pripensojn pri la defendo (18), konfesas mem, ke "la meĥanismo ŝajnas rompiĝema". Ĝi estas despli rompiĝema, ke la kontrolo far la centra potencularo al la taktikaj nukleaj armiloj estas ege hazarda.

Kondamnante landon sin turni al la atoma armilaro okaze de agresado, registaro igas ĝin atoma celtabulo antaŭece detruenda okaze de konflikto kaj kondamnas la landanaron al kolektiva memmortigo, kiun la registaro mem decidus laŭ propraj kriterioj; la landanoj estas nure kaj simple ostaĝoj de ĝia politiko, kaj tiuj ostaĝoj estas des pli minaceblaj, ke praktike ne ekzistas seriozaj ŝirmejoj.

Akcepti la nuklean armilaron estas do, fakte, akcepti fordoni sian destinon kaj la destinon de siaj filoj inter la manojn de kelkaj homoj, pri kiuj nenio certigas, ke ili estos ĉiam sufiĉe raciemaj kaj memregaj, kaj al kiuj oni konfidas povon, kiun neniam disponis absoluta monarko, neniam diktatoro.

---

(18)"Réflexions sur la défense", en "Revue de la défense nationale", oktobro 1973.

La misproporcio estas okulfrapa inter la necerteco de la protekto (veto!) kaj la absoluteco de la risko (tuta lando forstrekita el la mapo).

Neniu defendsistemo iam submetis landon al danĝero tiel grava.

b) La nuklea armilaro ne nur pligravigas la riskojn kaj la konsekvencojn de konfliktoj, sed ĝi pliprobabligas ilin.

Tiuj, kiuj kredas je la virtoj de la "perterura ekvilibro", forgesas bazan fakton : tiu ekvilibro estas konstante ŝanĝiĝanta; la politikan vivon de la tero trairas fluoj, kies potenco estas nek antaŭvidebla nek kontrolebla, kaj nenio, krom la fuma kurteno de la registaraj propagandoj kaj la naiva optimismo, kiun kreskigas la konsumsocio, permesas ekskludi la eblecon de komenco de nova konflikto.

Fenomenoj, kiel la evoluado de la rasismo pri la kreskanta malekvilibro inter industriigitaj landoj kaj landoj de la Tria Mondo, la superpopolizado kaj la senlaboreco, kiuj amase trafas tiujn lastajn landojn, la favora tereno, kiun ili donas por la apero de militaj diktaturoj, estas nur per si mem kapablegaj renversi kiel ludkartajnkastelojn la rompiĝemajn skafaldojn de la "terurekvilibristoj".

Tiuj ŝajnas restintaj ĉe la epoko, kiam nur Usono kaj Sovetio disponis nuklean armilaron. Nu, kiel generalo Gambiez montris en la "Revue de défense nationale" (revuo de nacia defendo) de januaro 1970, la malkonsila sistemo estas ŝagrino, kiu senĉese mallarĝiĝas laŭmezure kiel plimultiĝas la nombro da "ludantoj".

Nuntempe la "ludo" de la malkonsila defendsistemo kunigas jam kvin kunludantojn. Sed kiaj estos la perspektivoj de pludaŭrado de la atoma paŭzo, kiam 10, 20, 30 ŝtatoj disponos nuklean armilaron; kiam, en mondo troardigita per la mizero, kiun ne ebligos malpliigi la elspezoj por la vetkurado al armiloj, 10, 20, 30 ŝtatestroj povos, ĉiumomente, komencigi atomkonflikton, kaj vivos en la timo ne komencigi ĝin sufiĉe frue, antaŭ ol iliaj fuzebazoj estos neniigitaj; kiam 10, 20, 30 popoloj estos persvaditaj, per propagando kiel tiu, kiun jam travivis popoloj, ke la danĝero de la nuklea armilaro estas iluzia; kiam lokaj militoj, ĉiam pli furiozaj pro la vetkurado al armiloj, pelos

tutajn popolojn en tiel mizerajn situaciojn, ke iliaj registaroj povos opinii kolektivan memmortigon preferinda al malvenko ? Oni memoru la parolojn de doktoro Habache, estro de la Popola Fronto por Liberigo de Palestino, en septembro 1970 : "La Fronto pretas akcepti la riskojn de tria mondmilito, se tio povos servi ĝian celon". Estas en la historio malmultaj ekzemploj, kiam amasego da armiloj fine restis neuzata.

Neverŝajnaj hipotezoj ? Estas certe, ke nuklea politiko emas kreskigi la verŝajnecon, ĉar ĝi disvastigas per sia ekzemplo la ideon, ke iom grava nacio ne povas resti sen nuklea armilaro, kaj ke ĝi tiel favoras ties dissemadon.

Nuntempe 22 landoj (19) produktas sufiĉe da uranio por konsistigi al si nuklean forton. Nu, la problemo de la vehikloj, kiu ĝis nun estis la plej granda obstaklo kontraŭ la starigado de operacia nuklea armilaro, estas preskaŭ solvita. Kiel klarigas generalo Gambiez, la kemiaj laseroj sendube ebligos ekfunkciigi H-bombon sen la perado de A-bombo. Nu, H-bombo el 10 megatunoj demetita sur la margrundoj per simpla trolŝipo, 10 kilometrojn proksime de la marbordo de lando, estigas 200 metrojn altan sisman ondegon. (Se la eksplodo okazas 100 kilometrojn proksime de la bordo, la ondego estas ankoraŭ 50 metrojn alta, kiam ĝi disĵetiĝas). Tiel potencaj, tiel facile uzeblaj rimedoj igas apokalipsan nuklean katastrofon realigebla de la plimultaj ŝtatoj.

Imagi, ke tiaj eblecoj detrui saĝigos la ŝtatestrojn kaj igos la militon neebla, estas kredi, ke la milita fenomeno obeas nur raciajn kialojn ; tiel oni refaras la eraron de Alfred Nobel fine de la 19a jarcento : la potenco de la dinamito - li kredis - pro la hororo, kiun ĝi naskus, spronus la naciojn malmobilizi siajn trupojn kaj finigus la militon. Fakte, kiel skribis generalo Arnaud de Foïard : "Ĉiu militagado sekrecias toksinojn de malracio, des pli virulentajn, ju pli alta estas la grado de perforto. Nu, la nuklea perforto senpere atingas sojlon proksiman al la netolerebleco, kaj neniu povas antaŭvidi, ĉu ankoraŭ eblas racia konduto en tia etoso. La nuklea

---

(19) "L'Express", 1974/09/02.

sojlo estas do konfuzebla kun tiu de la absurdo : kiu ajn transpasas ĝin, tiu eniras la terenon de la neracieco kaj riskegas ne plu kapabli konservi la kontrolon de la ekstremiĝado". (Revue de la Défense Nationale, oktobro 1973).

Do, la nuklea armilaro, ne nur ne protektas la teritorion nek la landanaron, sed male multigas la riskojn de milito kaj kreskigas ĝian gravecon. Oni ne povas konsideri ĝin racia defendsistemo (20).

3. La popola perarmila defendo :

Konsciaj pri la neefikeco, pri la danĝero kaj pri la nepopulareco de la defendo, pluraj maldekstraj kaj ekstremmaldekstraj organizoj rekomendas defendsistemon, kiu konsistus en armado de la landanaro kaj starigado de la defendo per popolaj milicoj. La aprobantoj de tia defendo referencas la diversajn ekzemplojn de gerilo, kiujn raportas la historio, la civitanan militon en Sovetio, la diversajn formojn, kiujn alprenis la perarmila rezistado en Eŭropo dum la nazia okupado, la liberigajn militojn ĉinan, hindoĉinan, alĝerian, la defendsistemojn svisan, jugoslavan kaj albanan, kaj teorie la verkojn de Maŭ Zedong, de generalo Giap, eĉ de Jaurès.

Estas fakte iom malfacile precizigi, kia estus popola perarmila milito kontraŭ milita invado. La sistemigado de la popola perarmila defendo estas relative freŝdata kaj,

------

(20)Aldirendas, ke la riskoj de privata uzado de nukleaj armiloj kreskas laŭ ilia plimultiĝo kaj ilia disvastiĝo. "Ĉu veras, ke eblas aĉeti atombombon?" demandis Yves Barraud al Max Z., svisa armilnegocisto. "Prave", estis la respondo, "pli precize, taktikan atom-obuson" (Nouvel Observateur, 1973/11/26).
"New York Times" sciigis la 29an de decembro 1974, ke pluraj tunoj da uranio kaj plutonio malaperis en Usono, kaj ke eblas, ke terorismaj organizoj ilin proprigis al si por fari metiistajn bombojn. Ĉar sufiĉas al areto da homoj 40 funtoj da riĉigita uranio aŭ 12 funtoj da plutonio por finpretigi nuklean armilon kapablan mortigi milojn da homoj. El tio oni povas juĝi kian sekurecon promesas al ni la disvastiĝo de la nuklea armilaro kaj la plimultiĝo de la laŭdire "pacemaj" nukleaj centraloj.

laŭ nia scio, ne ekzistas iu historia ekzemplo pri lando provizita per tia defendsistemo, kiu estis invadita far alilanda armeo. Nek Svisio, nek Jugoslavio (depost 1945), nek Albanio, nek Ĉinio (depost la proklamo de la popola respubliko en tiuj du landoj) bezonis kontraŭstari invadon. Aliflanke, la geriloj ĉina, hindoĉina kaj alĝeria estis kaj estas revoluciaj militoj de malkoloniado, t.e. konfliktoj tre malsamaj de tio, kio povus esti milito de rezistado kontraŭ alilanda invado okazanta kiam la popola perarmila defendo estis jam organizita.

Oni povas do nur imagi, reference al tiuj diversaj ekzemploj, tion, kio povus esti la rezistado de armita popolo kontraŭ invado. Ĝi konsistus verŝajne malpli en la rezistado ĉe la landlimoj (la popola milito estas milito sen limoj kaj sen fronto, sen antaŭaĵo kaj sen malantaŭaĵo) ol en la trudado al la malamiko disigi siajn fortojn per ataketoj sur la tuta teritorio, ĝis li forlasos la terenon.

Ĉu tia defendsistemo ebligus atingi la celon fiksitan al ĉiu defendo : sekurigi la teritorion kaj la landanaron ?

Iuj opinias, ke lando, kies popolo estus armita, farus al eventuala agresanto tiel malkonsilan efikon, ke ĝi estus ŝirmata kontraŭ ia ajn invado. Tiu malkonsila efiko klarigus, ke Svisio ne estis invadita far Hitler, Jugoslavio far Stalin, Nordvjetnamio far la Usonanoj. Tamen, tiuj tri ekzemploj ne estas tre pruvaj, ĉar multaj aliaj kialoj, ĉefe en la internacia politiko, povas klarigi, ke tiuj tri landoj ne travivis la invadon, kiun ili povis timi. La ĉinoj, siaflanke, malgraŭ la vasteco de sia teritorio, la multeco de sia landanaro, sia sociologia konsisto ĉefe kamparana - tri faktoroj ege favoraj al popola perarmila defendo kaj do taŭgaj por malkuraĝigi eventualan agresanton - ne kredis efika tian defendsistemon kaj provizis sin per nuklea armilaro. Aliflanke, necesas memorigi, ke la malkonsilo efikas nur kondiĉe ke la kontraŭanto estu relative raciema. Nu, la historio sufiĉe pruvis, ke la ŝtatestroj povas implikiĝi en tute frenezajn entreprenojn. Neniu lando povas do fidi al la nura malkonsila efiko, nuklea aŭ popola, kaj ĉia defendsistemo devas kapabli pruvi sian efikecon kontraŭ fakta invado.

Gravas tie ĉi memorigi kelkajn el la propraĵoj de gerilo, pri kiuj la aprobantoj de tia defendo ne ofte emas kalkuli.

La unua propraĵo venas de la provizado de la rezistantaro per armiloj. Oni rajtas opinii, ke lando, kiu decidus organizi popolan perarmilan defendon, havus kiel unuan zorgon maksimuman malcentralizon de la armilindustrioj, por ke estu kiel eble plej malfacile al eventuala invadanto kontroli ilin. Sed, se malcentralizo de la uzinoj de leĝeraj armiloj estas konceptebla, tiu de la uzinoj de pezaj armiloj estas multe malpli imagebla, ĉefe en malgranda lando. Oni malbone vidas, kiel eblus malhelpi, ke tiuj uzinoj rapide falu en la manojn de agresanto rezoluta proprigi al si tiujn uzinojn je ia ajn prezo, detrui ilin aŭ simple malebligi ĉiun armil-eliron. Ekde kiam tiu estriĝo estus realigita, la landanaro disponus nur la provizon de leĝeraj armiloj. El kio konsistus la rezistado de landanaro alforĝita ĉe la grundo, kontraŭ la kirasveturiloj, la helikopteroj, la aviadiloj, la napalmo de kontraŭanto preta al ĉio ? Kiel diris Engels : "la spadoj ne kreskas sur la arboj" ; nek la maŝinpafiloj, la bazukoj kaj la misiloj. En lando, kie la armiluzinoj estus detruitaj aŭ kontrolataj de la malamiko, la rezistantaro povus provizi sin per armiloj nur alilande. Sed necesus por tio, kiel Régis Debray montris en sia verko "La kritiko al la armiloj" (21), ke la rezistantaro disponu la helpon de amika samlima lando. La gerilo fakte spertis nekontesteblajn sukcesojn nur en la okazoj, kiam tiu kondiĉo estis realigita (far Ĉinio por Hindoĉinio batalanta kontraŭ la Francoj, far Nordvjetnamio por Sudvjetnamio, far Tunizio por la alĝeria FLN, far la sendependa Gvineo por la PAIGC de Bisaŭ-Gvineo, far Zambio por Angolo, far Tanzanio por la FRELIMO). La studo pri ĉiuj nuntempaj popolaj militoj, ĉefe en malgrandaj landoj, kiuj devas lukti kontraŭ rektaj agresadoj de grandaj koloniaj aŭ imperiaj potencoj kun ege superaj teknikaj rimedoj, reliefigas ĉie kaj ĉiam la decidan rolon, kiun ludas la "sanktejo" de amika aŭ neŭtrala lando <u>samlima</u>. En lando kiel Francio, en la hipotezo de invado en Eŭropon tra oriento aŭ tra okcidento, el kiu najbara lando alvenus <u>dum sufiĉe da tempo</u> kaj <u>en sufiĉa</u>

-------

(21)franclingve : "La Critique des armes", ĉe Le Seuil, kolekto "Combats".

kvanto la armiloj necesaj por la daùrigado de la lukto?

Aliflanke, la aprobantoj de la popola perarmila defendo ofte forgesas, ke la sukcesoj de la gerilo ĉiam estis atingitaj en landoj, kie estis realigitaj du bazaj kondiĉoj : la ekzisto de vastaj naturaj ŝirmejoj malfacile penetreblaj (hindoĉina kaj afrika ĝangaloj, alĝeriaj montetoj) kaj landanaro ĉefe kampara. De la lasta mondmilito oni scias, ke la natura kaj homa geografio de lando kiel Francio malbone taùgas por tia lukto : "Krom eble ĉe monto Mouchet (altebenaĵo en Aùvernio, kie egaj luktoj okazis en junio 1944, kaj kiun la francaj rezistantoj fakte devis evakui), ĉiuj laùvicaj bataloj far la francaj makisanoj finiĝis per malvenkoj". (22)

Oni scias ankaù, kia estis la tragika fino de la batalo de la Vercors. Ankaù gravegas la problemoj starigitaj de la homa geografio al la gerilo. Tia rezistado, jam malfacile praktikebla meze de grandparte kampara landanaro, iĝas preskaù tute ne konceptebla en grandparte urbigita lando, kies teknika nivelo estas relative alta. Ne necesas multo por senigi tutan urbon je akvo, elektro kaj provianto. Kiom da Francoj, kutimigitaj al urba vivmaniero, konservus rezistemon post du tri jaroj da reĝimo simila al tiu, kiun suferis Vjetnamio dum preskaù 30 jaroj ? En meze aù ege industriigita lando, la popola perarmila rezistado estas efektive anakronismo kaj tre probable havus neniun sukceseblon kontraù malamiko preta al ĉio. Tio jam veris dum la nazia okupado : "Necesas honeste konfesi tion : kompare kun Jugoslavio, aù eĉ kun Grekio, la franca makiso restis limigita fenomeno. Nia lando havis jam altan viv- kaj ekipnivelon (ekzemple la ŝoseoj), kiuj igis la gerilon pli malfacila ol en subevoluinta lando; la civiliznivelo estis tia, ke oni hezitis riski la vivon kaj la havaĵojn de la landanaro, ĉar la historio de la makisoj estas malpli milita ol civila : ilia efikeco nepre dependis de la inklinoj de la ĉirkaùa loĝantaro" (23).

Krome, necesas insisti pri la progresoj de la milita tekniko por efike kribri teritorion. Ni lasu la parolon al Régis Debray : "La momenta transdonado de la ordonoj

-------

(22)Jean-Marie Domenach, en Le Monde, 1974/07/28.
(23)Jean-Marie Domenach, en Le Monde, 1974/08/29.

kaj la centralizado de la informoj per radio, kiuj ebligas al unuigita militestraro kunordigi la moviĝojn de la trupoj sur vasta teritorio; la dissemado de la operaciaj bazoj (militaerodromoj, aeroŝipaj bazoj, marŝipoj, provizejoj de brulaĵoj, armilejoj) kaj ankaŭ la protektadon de la lokoj kaj de la aparatoj kontraŭ ĉia surtera agreso aŭ esploratako; la absoluta kontrolado de la aero per la uzado de ĉas-aviadilaro kaj eĉ de bombadoj (eventuale per raketoj kun serĉkapoj) kontraŭ civilaj celoj eĉ meze de urboj, kaj de kirasveturiloj kontraŭ la liberpafistoj sur la tegmentoj; la ebleco kontroli ĉiujn komunikvojojn kaj la normalajn komunikilojn (telefonon, poŝton, perveturilan trafikon, ktp); la uzado de kirasveturiloj kontraŭ fiksaj celoj sen protekto; fine, loĝistika ilaro kvazaŭ senlima : ĉio tio, kontraŭ civilaj fortoj disigitaj, kun necertaj ligiloj, sen defendo kontraŭaviadila, sen motorizitaj fortoj, sen subtera ordonejo, sen elektronaj rimedoj kaj kun limigita kvanto da municioj, igas tian perarmilan konflikton, por profesia armeo, sadisma infanludo. Se la estraro de moderna armeo prenas la politikan decidon uzadi la tutan pafpotencon, kiun ĝi disponas, forlasante ĉian hontemon, ĉian humanan konsideron, neniigante ĉian individuan garantion (per milita leĝo, senjuĝaj ekzekutoj de rezistantoj, bombadoj per artilerio kaj aviadilaro de la sidejo de la plenumpotenco kaj de la grandaj popolaj partioj, okupado de la centroj de telekomunikoj kaj de la ordonejoj de la ĉefaj publikaj servoj, strikta dormosignalo dum pluraj tagoj, torturado de la malliberuloj kaj ĉantaĝado per la familioj, ktp), nenio kaj neniu povas haltigi tiun rulcilindron tiom longe kiom la batalado restas limigita al la ĉefurbo, sur la tereno de tradicia armita rezistado el fiksaj ejoj (kvartaloj, uzinoj aŭ ministrejoj)". Ni konfesas, ke tiu lasta fazo ŝajnas al ni superflua, kaj ke la aro da rimedoj, kiujn disponas la modernaj armeoj igas fakte iluzia ĉian provon de popola perarmila defendo. La militavantaĝo estas nuntempe ĉiam por la malplimultoj pretaj al la plej senkompata subpremado . Al aliaj rimedoj la popoloj devas sin turni, se ili reale deziras defendi sin.

Por persvadiĝi pri tio, sufiĉas vidi kiel oni traktis la civilajnlandanarojn, kiuj devis trasuferi jarojn da gerilo. En Alĝerio kaj Hindoĉinio, rastadoj, masakroj de

civiluloj, torturoj, seksperfortoj, deportadoj, estis la ĉiutaga pano de la popolo dum la tuta daŭro de la konflikto (la hindoĉina milito daŭras de antaŭ 30 jaroj, la celoj de Ho Chi Minh ankoraŭ ne estas atingitaj kaj estas ankoraŭ 200 000 politikaj malliberuloj en sudvjetnamaj malliberejoj aŭ "portigraj kaĝoj") (o)

Pri tia popola rezistado oni almenaŭ povas diri, ke ĝi iom malbone **respondas** la difinon de taŭga rimedo por defendi la landanaron kaj la teritorion.

Ni devas ankoraŭ aldoni kelkajn vortojn pri la memmastrumado de tia defendo : "la estroj estos elektitaj" diras ĝiaj aprobantoj, "la kadrigo rezultos de la agado". Ŝajnas, ke tiaj diroj fontas el romantikemo aŭ el la "lirika iluzio", kiun Malraux jam denuncis en "L'Espoir", dum la tempo de la milito en Hispanio. La luktado kontraŭ moderna armeo havas tiajn postulojn (militsekreton, kaŝecon, centralizadon de la decidoj, hierarkion surbaze de la kapableco samtempe milita kaj teknologia, ktp), ke ĝi povas naski, laŭ ni, nur hierarkian kaj piramidan defendsistemon, nekontroleblan de la bazo, kaj en kiu la tre granda plimulto el la civila landanaro devige havus la pasivan rolon de viktimaro kaj ostaĝaro.

Ni konkludu : Neniu metodo de perarmila defendo - tradicia milita defendo, nuklea defendo, popola perarmila defendo - vere ebligas atingi la difinitan celon : protekti la integrecon de la teritorio kaj la vivon de la landanaro. La permilita klopodo, kiun elmontras ĉiuj nacioj de la mondo (financa klopodo, intelekta klopodo, teknika klopodo, foroferado de la moralaj valoroj plej elementaj), ofte kaŭzas la komencon de militoj, ilian pligraviĝon, ilian pludaŭron, kaj ŝajne ne vere protektas la popolojn.

Tial ŝajnas nenie malracie esploradi kaj studadi la eblecon de neperforta defendstrategio.

-------

(o) Tia estis la situacio ankoraŭ en marto 1975, kiam aperis la originala teksto de tiu broŝuro (noto de la t.)

# Civila neperforta defendo

La senarmila aŭ neperforta defendo estis plurfoje rekomendata en diversaj landoj kaj, kiuj tion faris, tiuj ne ĉiam estis pacistoj aŭ neperfortuloj.

Majoro Stephen King-Hall, angla supera oficiro, rekomendas en sia verko "Defence in the nuclear age" (24), ke oni rezignu pri nuklea armilaro kaj ke oni kreu defendsistemon bazitan sur neperforto.

En 1964 Alastair Buchan, direktoro de Instituto pri Strategiaj Studoj en Londono, skribis : "Ĉar la klasikaj rektaj strategioj por protekti la nacian integrecon perdas iom el sia efektiveco pro la evoluado de armiloj kapablaj detrui tutajn civilizaciojn, kaj ĉar la malnovaj defendstrategioj fariĝis tute eksmodaj pro la teknikaj malkovroj, estas esence, ke ni atentu pli kaj pli forte la nerektajn strategiojn por antaŭgardi niajn sociojn kontraŭ fremda superregado aŭ aŭtoritato".

"Eblas ja, ke en konceptoj, kiel tiu de neperforta defendo, kuŝas la ŝlosilo de la sociprotekto, en mondo, kiu entenas tiom da eksplodemaj potencfortoj, ke la armiloj iĝos tro danĝeraj por esti uzataj" (25).

Endas legi ankaŭ la deklaron de la brita strategiisto Sir Basil Liddle Hart pri la civila neperforta defendo. (vidu aldonaĵon fine de tiu broŝuro).

Aliflanke, la sveda registaro petis de Adam Roberts tre detalan studaĵon pri tiu temo. Fine, en Norvegio la militrifuzantoj estas oficiale inicataj pri teorio kaj praktiko de neperforta defendo.

Jam venis la momento, kiam la francaj politikaj respondeculoj kaj civitanoj devas finfine atenti pri tiu defend-sistemo.

-------

(24) Gollancz, Londono, 1958.

(25) Antaŭparolo de la studaĵo "Civilian Defence", eldonita de "Peace News", Londono.

Kiuj estas ĝenerale la teknikoj pri neperforta defendo ? Kiuj povus esti la fazoj de neperforta defendo okaze de invado ? Kiuj estas la antaŭaj kondiĉoj, por ke tia defendsistemo povu esti efika ? Kiel oni povus transpasi de la nuna defendsistemo al neperforta defendo ?

Jen kvar demandoj, kiujn ni provu respondi.

1. Teknikoj pri neperforta lukto :

Tiuj teknikoj estis praktikitaj antaŭ ol esti teoriigitaj kaj tio dum cirkonstancoj politikaj, ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj ege diversaj : en la Tria Mondo same kiel en la industriigitaj landoj, far kamparanoj aŭ urbaj loĝantaroj, far profunde religiemaj aŭ oficiale senreligiaj popoloj, far subpremataj malplimultoj aŭ koloniitaj amasoj, dum enlandaj luktoj kontraŭ nacian registaron aŭ kontraŭ fremdan invadanton, ktp.

Pli precize, la luktoj al kiuj oni povas sin turni estas jenaj : la lukto kontraŭ la koloniadon en Hindio; iuj epizodoj de la rezistado de Norvegoj, Danoj kaj Bulgaroj kontraŭ la Naziojn dum la lasta mondmilito; la lukto gvidata de Danilo Dolci, Lorenzo Barbera kaj Sicilianoj kontraŭ "Mafia"n kaj la subevoluecon de Sicilio; la lukto por civitanaj rajtoj de l'Nigruloj en Usono; la rezistado de Ĉeĥoslovakoj al la trupoj de la Varsovia Pakto; la agado de la meksikiana malplimulto en Kalifornio kontraŭ la grandajn agrokulturajn trustojn; tiu de la Judoj en Sovetio kontraŭ la sovetanpovo, ktp.

La metodoj uzataj dum tiuj diversaj kampanjoj prezentas komunajn aspektojn, kiujn oni devas precizigi. Gravas, ke oni ilin konsideru laŭ ĝenerala maniero unue, antaŭ ol studi kiel oni povus uzi ilin kontraŭ armitan invadon.

a) neperforto kontraŭ la personoj :

Tiu unua punkto, kiu fakte estas nur unu el ĝiaj aspektoj, estas verŝajne tiu, kiu kaŭzis al neperforto plejan miskomprenon. Reduktante ĝin nur al rifuzo perforti personojn, oni ĝin karikaturis kaj facile konfuzis ĝin kun la pasiveco aŭ eĉ kun malkuraĝo. Neperforto, reduktita al tiu rifuzo, verŝajne neniam estus sukcesinta.

Loki rifuzon al perforto nur sur la moralan terenon, estas cetere tre dubsenca. Oni povas esti, el morala vidpunkto, nekompareble pli kulpa, estante komplico pro pasiv-

eco en perforta sistemo, ol atakante la agantojn de tiu sistemo. Kiuj, pro morala skrupulo, aŭ pro falsa pacismo, akceptis pasive la nazian okupadon, tiuj estis komplicoj de pli da perfortaĵoj, ol la rezistantoj, kiuj uzis la armilojn por ĉesigi la monstran perforton de la nazia sistemo.

Ĉar ni konsentas, ke popolo invadita de alilanda armeo havas justajn kialojn por defendi siajn vivon kaj liberon, ni lokos nin tie esence sur la taktikan terenon por prezenti la principon pri rifuzo al perforto kontraŭ la personoj.

Oni ja riskas, uzante ĝin sen precizigi ties sencon, konfuzi "personon" kun kolektiva komplika sistemo. Respekti la kontraŭulon, dum neperforta batalo, estas respekti la personojn, sed ne la sistemon, kiun ili defendas, aŭ kies instrumentoj ili estas, sistemon, kiun oni celas senpotencigi aŭ eĉ detrui.

Sed erare estas kredi, ke la nura maniero por detrui maljustan sistemon, estas uzado de armita perforto kontraŭ la personojn, kiuj ĝin defendas.

Politika sistemo ja neniam estas homogena kaj monolita bloko. Oni ĉiam povas distingi en ĝi tri grandajn elementojn :

- malplimulto, kiu tenas la politikajn kaj ekonomiajn regilojn;
- silenta plimulto, konvinkita aŭ rezignacianta, trairita de opozicia fluo kaj plejofte submetita al intensa propagando;
- policistoj kaj militistoj, armita forto de la sistemo , kiu ebligas al la registaro pluresti surloke.

Ĉiu el tiuj elementoj estas mem trairita de diversaj fluoj, kiuj ĉiumomente povas endanĝerigi la unuecon de la tuto.

Lukti kontraŭ politikan sistemon (kaj invadarmeo estas nur elemento de politika sistemo), uzante armitan perforton, estas unue plifortigi tiun sistemon, kiu iĝas unuiĝinta bloko, cementita per la naciismo kaj la militista ekzaltiĝo de unuj kaj per la memkonservemo de aliaj.

Ekde kiam tiu unueco estos realigita, eblos supervenki la sistemon per armita perforto, nur starigante kontraŭan sistemon, tiel monolitan kaj portantan la samajn difektojn, kiel tiu, kontraŭ kiun oni volis batali.

Male, la malesto de perforto kontraŭ la personoj, se ligita al klare perceptitaj agoj atakantaj la maljustecon, tute ne akcelas la formiĝon de unueca bloko ĉe la kontraŭulo : ĝi celas izoli la malplimulton respondecan pri tiu maljusto, malfortigante ĝian ligilon kun la publika opinio kaj ties agentoj. Ja tiel la dialogeblecoj restas sendifektaj inter la viktimoj de la subpremo, la silenta plimulto, kaj la agentoj de la regpotenco (policistoj kaj militistoj). Nu, tiu komunikeblo estas vera danĝero por la reganta malplimulto, ĉar ĝi endanĝerigas la efikon de ĝia propagando kaj igas pli malfacile aplikebla la subpremadon, kiun ĝi povus ekpraktiki.

Kontraŭe al tio okazanta en perarmila batalo, kiam, tre ofte, "interbuĉas homoj, kiuj ne konas unuj la aliajn, je l'profito de aliuloj, kiuj interkonas sed ne interbuĉas", la neperforta lukto ebligas al tiuj, kiuj en aliaj cirkonstancoj estus interbuĉintaj, ke ili pli bone interkonatiĝu, kaj malfortigas la potencon de tiuj, kiuj estus profitintaj de la buĉado.

Plie, dum la perarmila batalo plejofte ostaĝigas kaj viktimigas la virinojn, la infanojn kaj la maljunulojn, la neperforta lukto ebligas al la tuta popolo aktive partopreni en la agado. Tiel multiĝas la nombro da aktivuloj kaj la partopreno de la virinoj kaj maljunuloj al publikaj manifestacioj povas nur malhelpi la akrecon de la subpremado kaj igi ĝin pli abomena.

b) <u>Evidentiĝo de la maljusto</u> :

Neniu regpotenco povas longe firme teni sur sia loko, ne protektante almenaŭ la ŝajnecon de justeco antaŭ la okuloj de la internacia opinio, de la silenta plimulto kaj de la agentoj, sur kiuj ĝi sin apogas. Eĉ diktatora regpotenco ne povas forhavi honoran garantion, sen kiu ĝi riskus perdi la apogfortojn, kiuj al ĝi nepre necesas. La Hitlera povo mem - oni tion vidos poste - devis retroiri antaŭ la simpla diskonigo de unu el siaj abomenaĵoj.

Alidirite, fronte al maljustaĵo, la unua nepra agado estas diskonigi ĝin. Ĝiaj farintoj troviĝos en situacio des pli malfacila, ju pli evidentiĝos la maljustaĵo por ĉiuj kategorioj de la publika opinio, inkluzive de tiu de la agentoj de la establita povo.

Unu el la ĉefaj avantaĝoj de la neperforta lukto estas

konservi ebla la dialogon je ĉiuj niveloj, kio malebligas al la kontraŭa potenco malaranĝi la aferojn : estas facile konfuzigi la agadon de armitaj makisanoj kun rabado; akuzado iĝas pli malfacila, kiam temas pri tuta popolo venanta nudmane alfronti policon aŭ armeon kaj akceptanta sen rezisto sian arestadon, cetere profitante la okazon por klarigi sian situacion al policistoj kaj soldatoj.

Tiu sinteno, kiu supozigas, ke la timo pro ĝendarmo kaj leĝo estas supervenkita de la prematoj kaj ke ili estas pretaj elporti la konsekvencojn de sia sinteno, estas neniel malpli heroa, ol tiu de la soldato sur batalkampo. La sperto pruvis en Hindio, Usono, Ĉeĥoslovakio, ke la plej diversaj popoloj kapablas tion. Plie, tiu sinteno havas la grandegan avantaĝon ebligi al ĉiuj observantoj vidi kie estas maljusteco, kie estas subpremado. La perfortaj agoj, male, fine ĉiam kaŝas la kaŭzon, kiel ajn justa ĝi estas, pro kiu oni batalas.

Iuj el la uzindaj rimedoj por diskonigi maljustaĵon havas nenion speciale neperfortan : prospektoj, komunikaĵoj al la gazetaro, ktp. Same, la viktimoj de maljusto uzos ĉiujn rimedojn livereblajn de la leĝeco, aŭ de ties restaĵoj dum krizokazo, antaŭ ol paŝi al aliaj agadformoj.

Sed neperforto krome proponas rimedojn speciale adaptitajn al la proklamado de maljusteco, eĉ kiam la kutimaj informrimedoj estas en la manoj de la kontraŭulo : malsatstriko, sidostriko, enkatenigoj, loktenado, ĉio ĉi kun akompana disdonado de zorge preparitaj prospektoj. Tiuj diversaj manifestacioj povas ebligi la publikan diskonigon de maljustaĵoj, kiujn la regpovo deziregas kaŝi. La interveno de famuloj aŭ eminentuloj varbitaj al la celaro de la rezistantoj povas esti decidiga en tiuj cirkonstancoj.

c) La nekunlaborado :

La neperforto kontraŭ la personoj kaj la plenluma diskonigo de la maljustaĵoj estas nur du el la aspektoj de la neperforta lukto, kiu inkluzivas ankaŭ prem- kaj trud-metodojn multe pli aktivajn.

Unue staras la nekunlaborado. Regpovo, se ĝi ne povas pluekzisti sen honorindeca garantio, bezonas ankaŭ aktivan aŭ pasivan kunlaboradon de almenaŭ ampleksa malplimulto

el la popolo. Necesas al ĝi ŝtatoficistoj, impostpagantoj, laboristoj, aktivaj konsumantoj, ktp. Tuj kiam grava kategorio el la popolo rifuzas kunlabori, malfacila fariĝas la situacio de la regpovo. Ĝi fariĝas neeltenebla, se la rifuzo ĝeneraliĝas.

La neperforta strategio proponas serion da metodoj pri nekunlaborado, kiuj respondas la diversajn partoprenmanierojn de la civitanoj en la socivivo : ĉiuspeca striko (parta, ĝenerala, turniĝanta, fervorstriko) por la laboristoj, bojkoto por la konsumantoj, rifuzo aŭ redisdonado de la imposto por la impostpagantoj, eksiĝo, resendo de titoloj aŭ ordenoj por la "eminentuloj".

La nekunlaborado povas esti simbola kaj minoritata komence de la lukto por atentigi pri iu problemo; tiam ĝi celas ĉefe la publikan opinion. Kiam tiu ĉi estas informita, la nekunlaborado povas iĝi amasa. Tiam ĝi rekte celas malfortigi la povon de la respondeculoj de la maljustaĵo.

ĉ)<u>La civila malobeemo</u> :

La civila neperforta malobeado estas malkaŝa malobeado al maljustaj leĝoj. La diferenco kun nekunlaborado estas relativa : striko estas simpla nekunlaborado, kiam ĝi estas laŭleĝa; ĝi fariĝas civila malobeado, se la leĝoj ĝin malpermesas. Male, la impostrifuzo jam estas civila malobeado. Tiu ĉi iel estas formo de nekunlaborado, kiu vokas kaj instigas al subpremo. Ĝia taŭga uzo estas do ligita al taksado de la alfrontiĝantaj fortoj. Estus sensence, dum politika batalo, praktiki tiun malobeadon tiel, ke ĝia subpremo havos nenian eĥon ĉe la publika opinio kaj rezultigu la likvidadon de la aktivuloj. Kampanjon de civila malobeado devus ĉiam antaŭi kampanjo por informado orientita samtempe al la silenta plimulto kaj al la subpremaj fortoj.

Trudi al la regpovo respondeca pri maljustaĵo, ke ĝi subpremu, samtempe malhelpante, ke ĝi tion faru efike, dank'al firma tenado de streĉa ligilo kun la silenta plimulto kaj la agentoj de la regpovo; tiel forpreni de ĝi la subtenon de la popolo; daŭrigi la informadon, la nekunlaboradon kaj la civilan malobeadon ĝis ĝi estos devigata cedi pro la premado de la publika opinio aŭ de la neperforta trudado, jen estas funde la bazo de neperforta strategio.

Sinturno al civila malobeado estas unu el la punktoj,

malebligantaj, ke oni limigu la neperfortan agadon al leĝa politika agado. (Fiaskis ja tiu lasta en Ĉilio kaj ne la neperforto, male al tio, kion oni ofte diras).

d)Paralelaj institucioj kaj kontraŭpovo :

Trans la rifuzo kunlabori kun la respondeculoj de maljusto, same trans la rezisto al iliaj leĝoj, neperforta lukto povas iri - eĉ devas iri, kiam ĝi iĝas tute senkompata - ĝis la starigo de kontraŭpovo kaj de paralelaj institucioj.

Kiam la situacio tion ebligas, tiam temas pri funkciigado de la publikaj servoj, de la produkt- kaj konsumkonektiloj, de la komunikiloj, ktp, por la nura profito de la popolo kaj lime, krei kontraŭregistaron komisiitan por kunordigi la rezistagadojn naciskale.

o o
o

Oni vidas do, ke la neperforto povas proponi al popolo aron da rimedoj tre adapteblaj por respektigi ĝiajn rajtojn. Kompreneble, tiuj rimedoj ne estas receptoj, kiuj certigus la sukceson en ĉiuj cirkonstancoj. La neperforta lukto ne pli ol la armita lukto liberigas tiujn, kiuj ĝin gvidas, de rigora analizo pri la alfrontiĝantaj fortoj kaj de la politika, ekonomia, socia kaj milita situacio. Ĝi ne liberigas ilin precipe pri disciplino, imagemo, taktika elpensemo kaj kuraĝo. ("Mi bone vidas, diris Gandhi, kiel mi povas instrui neperforton al perfortulo, sed mi ne povas ĝin instrui al malkuraĝulo").

Tamen ŝajnas al ni, ke la raporto pri tiuj metodoj sufiĉe montras, ke popolo sen murdaj armiloj estas ankoraŭ for de senrimedeco kaj ke la kombinita uzado de tiuj diversaj metodoj, je ĉiu momento de la lukto, donas verajn venkeblecojn super kontraŭulo, kiel ajn forta li estas.

Ni esperas, ke oni komprenis, ke la neperforta lukto tute ne konsistas imagi, ke la kontraŭulo kondutos "ĝentile"; ĝi nek subtaksas lian perfort-kapablon, nek pretendas "forpuŝi perforton el historio".

La neperforta taktiko kalkulas kun perforto. Sed, anstataŭ peni por venki ĝin per pli granda perforto, ĝi strebas unue por malfaciligi ties uzadon, poste por utiligi la perforton de la kontraŭa sistemo por ĝin malekvilibrigi, por malorganizi ties unuecon kaj fine ĝin senpotencigi.

Kontraŭe al la metodoj de armita batalo, kiuj ĉiuj postulas fakte la subtenadon de grandaj nacioj, tiu defendmetodo, same kiel ĵudo en la individua lukto, ebligas al la plej malfortaj malplimultoj kaj kompreneble al la popoloj decidintaj respektigi sin, ke ili certigu sian propran defendon.

Ŝajnas al ni, ke oni devus zorge analizi la marksistan argumenton, laŭ kiu perforta alfrontado estus neevitebla dum revolucia socia transformado. La aprobantoj de la neperforta rezistado ja ne neas, ke iliaj kontraŭuloj povas uzi perforton kaj ke povas okazi sangelverŝo. Tiu rimedo ŝajnas eĉ neevitebla flanke de prema regpovo. Sed ke la subprematoj povas supervenki tiun perforton <u>nur per kontraŭa perforto</u>, tion ili neas. Historio montras, ke eblas uzi perforton de kolektiva kontraŭulo por meti ĝin en tian situacion, ke ĝi ne plu povu uzi tiun saman perforton pro la timo perdi la helpojn, al ĝi nepre necesajn, de la publika opinio kaj de la armitaj fortoj, kiujn ĝi uzas por konservi sian potencon.

Kiuj asertas, ke ekde kiam estas atingitaj favoraj cirkonstancoj por la subprematoj, tiam la perforta alfrontado kaj do la popola perforto iĝas neeviteblaj, tiuj ŝajnas al ni dogmece elimini jenan fakton : en tiaj cirkonstancoj amasa agado de nekunlaborado, civila malobeado, kaj civila obstrukcado ligita kun intensa informado al la policanaro kaj al la armeo, estus tre verŝajne multe pli efika ol barikadoj aŭ civila milito, kiuj fordonas la sorton de la subprematoj al la milithazardo. En tia cirkonstancaro, ĉiuj elpremoj, kiujn povus provi la regpotenco, returniĝus kontraŭ ĝin kaj malsolidarigus de ĝia celo la silentan plimulton kaj la agentojn, kiujn ĝi uzas por sia subpremado. Do, se okaze de alfrontiĝo inter premantoj kaj prematoj perforto estas neevitebla, tio estas nur flanke de la premantoj, sed ne flanke de la prematoj. La neperforto ebligas al tiuj ĉi uzi la perforton de la subpremantoj por senpotencigi ilin.

Plie, en kazo de revolucia neperforta transformiĝo, la iniciativo povus resti konstante ĉe la bazo kaj estus multe malpli granda la risko de manipulado de la revolucia movado fare de "avangardo", kiu pretendus ĝin regi kaj alkonduki ĝin al diktaturo.

Restas por diri, kiel oni povus uzi tiujn neperfortajn rimedojn fronte al alilanda invadanto.

2. Skizo de kampanjo de civila neperforta defendo

Por montri sen pluatendi, kio povus esti neperforta defendo kontraŭ alilanda invado, jen la procezo, laŭ kiu povus disvolviĝi tia kampanjo. Poste ni parolos pri la pretigoj kaj la nepraj kondiĉoj, por ke tia kampanjo povu realiĝi. Do la leganto senĉese konsciu, ke neperforta defendo povas funkcii efike, nur kondiĉe ke antaŭu ĝin serioza preparado. Oni povas distingi tri fazojn :

a) Dum la invado.

Se malgraŭ ĉiuj klopodoj de traktado kaj interkonsentado faritaj en neperforta perspektivo, okazas invado, neperforta defendo verŝajne ne povos haltigi ĝin pli bone ol milita defendo. Nuntempe (sed eble pro manko de studoj pri tiu temo), ĝi ne celas defendi la geografiajn landlimojn. Kio estus realigebla en strato de granda urbo - en Bratislavo, la Ĉeĥoslovakoj sidiĝis antaŭ la sovetaj tankoj - tio ne eblas sur vastega defendlinio. Estus evidente utopie, pretendi haltigi kirasveturilojn, kuŝiĝante tra ilia vojo (26).

Tamen, dum tiu unua fazo, neperforta rezistado prezentus tri avantaĝojn gravegajn kompare al perarmila defendo.

- Unue, la foresto de perarmila rezisto verŝajne igus tiun periodon de la konflikto multe malpli murdplena ol la invadoj, al kiuj la historio kutimigis nin. Eĉ probablas, ke tre malmultajn perfortaĵojn farus la invadaj trupoj kontraŭ la landanaro, ĉar invadanto ĝenerale ŝatas prezenti sin kiel liberiganton. Tamen, se tio okazus, tiam oni devus uzi la ĉi-subajn metodojn de memdefendado.
- Dua avantaĝo kompare al la milita defendo : la tuta landanaro, inkluzive de la viroj, restadus kaj rezistadus surloke, tie, kie rezistado plej efikus. Tiel oni evitus la konsiderindan malfortiĝon, rezultantan el milita mobilizado : disiĝo de la familioj, malfortiĝo de la ekonomia aktiveco, sendo de la viroj al regionoj aŭ landoj, kiujn ili ne konas. La invadaj trupoj, kiuj siaflanke konsistus el soldatoj elradikigitaj, elŝiritaj el siaj familioj pro la mobilizo, troviĝus do fronte al landanaro, kies socia

---

(26) Oni notu, ke la aprobantoj de perarmila defendo ../..

strukturo estus senŝanĝa kaj kiun longa praktikado de la neperforta agado estus kutimiginta ne tro maltrankviliĝi pro alfrontado kontraŭ subpremaj fortoj. Krome, la invado naskus - kiel okazas eĉ okaze de milita rezistado - blokan unuiĝon de la landanaro kontraŭ la invadantaro.

- Fine, tria avantaĝo : en bone preparita neperforta agado, atakon far la kontraŭanto oni konsideras ne kiel propran malsukceson, sed kiel malprudentaĵon lian, kaj ĝin oni povos utiligi. Landanaro vere konscia pri tio, kio estas neperforto, konsiderus la invadon kiel komencon de multaj zorgoj, certe, sed ankaŭ kiel enretiĝon de la kontraŭa armeo, kaj ekpretiĝus eltiri la tutan profiton el tiu situacio. Tiu ofensiva sinteno, ofte konstatita en kampanjoj de neperforta agado, estas la malo de defetismo, kiu minacas ĉiun invadatan landanaron, kaj ĝi konsistigus kontraŭ ĝi la plej bonan protekton.

La ĝenerala taktiko adoptenda dum tiu fazo de la konflikto estus eviti la alfrontiĝojn kun la invadaj trupoj tiom longe, kiom tiuj ne estos stabiligitaj kaj ne havos tempon por konatiĝi kun la enloĝantaro tia, kia ĝi reale estas, kaj ne tia, kia la propagando prezentis ĝin al ili. La neperforta agado fakte estas des pli efika, ju malpli anonima ĝi estas kaj ju pli da okazoj konatiĝi havis la interbatalantoj.

En la kadro de tiu taktiko, oni povas konsideri du agmetodojn :

- la landanaro restas hejme kaj lasas la stratojn senhomaj dum la preterpasado de la invadaj trupoj; tamen, surskribaĵoj sur la muroj povas memorigi al ili, sen malamo, ke ili havas nenion por fari en tiu lando.
- male, la landanaro invadas la stratojn, ekparolas kun la militistoj kaj, aŭ rekte, aŭ per flugfolioj verkitaj en la lingvo de la invadantoj, informas la soldatojn pri la efektiva situacio kaj antaŭsciigas al ili, ke la landanaro, sen fari al ili la plej etan malbonon, tamen neniam konsentos obei ilin.

Oni notu, ke en la preparado de neperforta defendsistemo

-------

mem ne plu kredas je la ebleco haltigi invadon ĉe la landlimoj : "En nuntempa cirkonstancaro, la gardo ĉe la landlimoj estas eksvalida koncepto", asertis sinjoro Robert Galley, franca ministro de la armeoj, en parolado eldirita en Barcelonnette (1974/02/01).

necesas la studado de plejeble multaj lingvoj far la landanaro. Okaze de tuja danĝero, povus okazi akcelataj kursoj. Kaj, dum pacotempo, tia studado, per la kontaktoj kaj interŝanĝoj, kiujn ĝi favorus inter la popoloj, malfaciligus la aperon de naciismo kaj ŝovinismo (°).

En la unuaj momentoj de la invado kaj laŭ la cirkonstancoj kaj la sinteno de la trupoj,oni povus decidi pri rimedoj por malrapidigi ilian antaŭeniradon kaj malsimpligi ilian taskon : i.a. la ordinterŝanĝo aŭ la forigo de indiktabuloj ĉe la ŝoseoj kaj de la ŝildoj kun la nomoj de la stratoj kaj la domnumeroj en la urboj. Tiaj rimedoj igus la landon konfuzega labirinto kaj ekzemple ege malfaciligus la serĉadon kaj areston de personoj, kiuj povus estri la rezistadon.

b) <u>Dum la milita okupado</u>.

Kiam la trupoj estus stabiligitaj, tiam komenciĝus la dua fazo de la rezistado, kiu mem estus duaspekta : defenda kaj ofensiva.

La trejnado al neperforta defendo povus notinde (pri tio ni reparolos) veki ĉe la landanaro tre profundan konsciiĝon pri tio defendenda. Neperforte oni defendus ne la landlimojn (kiel ni jam vidis), sed la moralajn kaj politikajn limojn, la vivon de la landanaro kaj ĝiajn bazajn rajtojn : libero paroli kaj kunveni, libero por la gazetoj, libero de voĉdonado, de la strikoj, de la vivmaniero, de la kredoj. La defendtaktiko celas do malebligi al la invadinto ĉian atencon kontraŭ la homrajtoj kaj persiste defendi la publikajn liberojn. Oni devus antaŭorganizi sistemon por interligi kaj rapide transsendi, tiel ke la plej eta atenco kontraŭ la homrajtoj, la malplej grava aresto estu tuj sekvota de manifestacioj adaptitaj al la cirkonstancoj kaj celantaj informi samtempe la tutan landanaron kaj la subpremantojn.

Grava precizigo : tiu interlig-sistemo devus esti kiel eble plej malcentralizita por ke la invadinto ne kapablu kapti ĝin (multiĝo de la radiodissendiloj, de la presejoj, de la hektografejoj, al kies funkciado kiel eble plej

-------

(°)Noto de la trad.: Estas konsilinde, ke la legantoj de tiu ĉi broŝuro skribu al ĝiaj francaj diskonigantoj (adreso fine de la konkludo) por atentigi ilin pri la rolo de Esperanto en la lukto kontraŭ naciismo kaj ŝovinismo.

multaj homoj devus esti inicitaj). Tiun informadon oni farus kiel eble plej malkaŝe kaj tiu rajto je informado estas unu el tiuj, kiujn oni devus defendi plej malcedeme. Tamen, se la cirkonstancoj tion necesigus, la uzado de tiuj informrimedoj povus okazi kaŝe (oni scias la gravecon de la kaŝitaj dissendiloj dum la ĉeĥoslovaka rezistado kaj de la "Samizdat", hektografitaj tekstoj, kiuj kaŝe cirkulas en Sovetio).

Landanaro, kutimanta ne permesi atencojn kontraŭ la rajtoj de la personoj kaj tuj reagi, fariĝas por invadinto aŭ diktatoreca potenculaꞏro muro, kontraŭ kiu frakasiĝas ties perforto.

Fakte, la plej aĉa diktatoro, kia ajn lia malestimo al la homaj rajtoj, ne povas - tion ni vidis - rezigni la kunlaboradon de sufiĉa parto el la landanaro. Ekde kiam tiu kunlaborado mankas al li, lia potenco estas endanĝerigita, kaj malveras aserti, ke li povas ĉion permesi al si.

El la regpovoj, kiuj ekzistis dum la historio, la hitlera estis unu el la plej malzorgemaj pri homrajtoj. Nu, plurfoje, pri precizaj punktoj, tiu povo frakasiĝis kontraŭ oberifuzo de senarmilaj personoj aŭ popoloj, kiuj rifuzis al ĝi sian kunlaboradon. Kaj Hitler devis cedi.

La 1an de septembro 1939, Hitler ordonas, ke oni mortigu sur la germana teritorio ĉiujn alienulojn kaj nekuraceblulojn. Tiuj ekzekutadoj daŭradas ĝis en 1941, spite diversajn privatajn protestojn de iuj episkopoj. La 3an de aŭgusto 1941, Galen, episkopo de Munster, decidas denunci publike tiujn murdojn. Lia prediko, eldirita en la preĝejo de Sankta-Lamberto en Munster, estas diskonigata en la tuta Germanio kaj ĉe la frontsoldatoj. Pluraj oficialuloj proponas mortigi episkopon Galen. Bormann konsentas, sed Goebbels opinias male : "Se oni provus ion ajn kontraŭ la episkopo, estus timende, ke la loĝantaro de Munster oni devus konsideri perdita dum la tuta daŭro de la milito, kaj ke estus nepre perdita la tuta Vestfalio". Iom post la prediko, la eŭtanazia programo estas oficiale haltigita kaj neniam rekomenciĝos (27).

-------

(27)Lewy (Guenter) - L'Eglise catholique et l'Allemagne nazie - Stock, 1964 - paĝo 231.

En marto 1941, konferenco de naziaj spertuloj decidas la trudan rompon de la interraciaj geedziĝoj : la judan edzon oni deportos. En februaro 1943, dum la deportado de la lastaj germanaj judoj, Gestapo ekkaptas plurajn milojn da kristanoj el juda deveno. La 17an de februaro en Berlino, Gestapo arestas ĉirkaŭ 6 000. Sed tiam okazas neatenditaĵo : la arjaj edzinoj sekvas siajn edzojn ĝis la loko de ilia provizora enŝloso kaj postulas ilin dum horoj, kriegante. Ĉar la sekreto de la detrua mekanismo estas minacata, Gestapo cedas kaj la izraelidoj edziĝintaj kun kristaninoj estas reliberigataj (28).

En Danio, la rifuzo kunlaboradi far la dana popolo kaj ĝia reĝo, kvankam ĝi ne povis malebligi la persekutadon kontraŭ la judoj, tamen konsiderinde prokrastis ĝin kaj limigis ĝiajn konsekvencojn. Ekde kiam la germanoj ordonis al la judoj surporti flavan stelon, tiam la reĝo Kristiano la Deka instigis la Danojn solidariĝi kun la Judoj. Kiam la minaco preciziĝis, la Danoj helpis la minacatajn familiojn fuĝi al Svedio. Dank'al la nekunlaborado de tiu senarmila popolo, la nazia popolmurdo ege malpli sentiĝis en Danio, ol en aliaj okupitaj landoj. El pli ol 7800 danaj Judoj, skribis Hannah Arendt, la germana polico povis aresti nur 447 homojn. La efiko de la neperforta rezistado al la naziaj responsuloj instigis ilin peti mem, ke la danaj Judoj estu sendataj al relative privilegia getto: tiu de Theresienstadt, en Ĉeĥoslovakio. Nu, ankoraŭ tie, la danaj Judoj "ĝuis pli ol iu ajn alia grupo specialajn privilegiojn, ĉar la institucioj kaj privatuloj senĉese petis informojn pri ilia sorto". El ili kvardek ok mortis: tiu nombro estas relative eta pro la meza aĝo de tiu grupo. En sia proceso, Eichmann opiniis, post longa pripensado, ke "pro diversaj kialoj, la operacioj projektitaj pri la Judoj de Danio malsukcesis".

Li spertis similan malsukceson en Bulgario, kie la landanaro kaj la instancoj malkaŝe solidariĝis kun la Judoj. En tiu lando, rakontas Hannah Arendt, la rezulto estis ankoraŭ pli frapa : spite la klopodojn de la nazioj, neniu Judo estis deportata, neniu mortis pro kialo nenatura".

-------

(28) Guenter Lewy - L'Eglise catholique et l'Allemagne nazie - p. 250.

Fine, en Norvegio okazis unu el la plej rimarkindaj agadoj de neperforta rezistado por savi gravegan instiitucion : la lernejon.

En februaro 1942, dum la tuta Norvegio estas okupita de jam preskaŭ du jaroj, Vidkun Quisling, fidulo de la nazioj, fariĝas estro de la registaro. Li decidas fondi korporacian ŝtaton, kiu havus kiel bazon la instruistaron kaj junularan asocion similan al la hitleraj junularoj. Ĉiuj instruistoj devos fariĝi membroj de nova sindikato estrata de Hird, norvega Gestapo.

La 20an de februaro, pro la peto de la gvidantoj de la rezistado, inter 8000 kaj 10000 el la 11000 instruistoj sendas leteron, per kiu ili rifuzas aliĝi al tiu nova organizaĵo de la instruistoj. Kvar tagojn poste, la episkopoj, pro solidareco, eksiĝas el siaj oficialaj funkcioj kaj 150 universitataj profesoroj protestas kontraŭ la nova junulara asocio.

Tiam frapas la punagado : 1300 instruistoj estas arestitaj kaj deportitaj al koncentrejo, je 200 kilometroj norde de Oslo; kelkajn semajnojn poste, duono el ili estas sendita al la ekstrema nordo de Norvegio, je 400 kilometroj post la pola cirklo. Sed, dum tiu tempo, reto de solidareco subtenas iliajn familiojn, kaj la instruistoj, kiuj restas liberaj, daŭrigas sian rifuzon aliĝi al la organizaĵo kreita de la registaro.

Fine, post ok monatoj, Quisling, pro ordono de Hitler, konfesas sin venkita kaj liberigas la deportitajn instruistojn. "Vi, instruistoj, ĉion damaĝis al mi", li devis agnoski.

Tiuj kvar ekzemploj de neperforta rezistado kontraŭ la plej diktatoreca sistemo, kiun iam spertis Eŭropo, montras, ke tiu formo de defendo donas al la landanaroj realan povon kontraŭ la plej rezolutaj kontraŭuloj. Tamen, en tiuj kvar kazoj, la neperforta rezistado estis improvizita, ĉar la landanaro neniel estis preparita. Se popolo dediĉus al la preparado de neperforta rezistado la duonon de la klopodoj kaj de la monrimedoj, kiujn oni rezervas por milita defendo, ĝi estus, preskaŭ sen ajna dubo, multe pli bone defendata ol per perarmila defendsistemo (29).

---

(29)En Sovetio, per neperforta okupado de la halo de la Centra Komitato de la komunista partio en Moskvo, ../...

La brita strategiisto Sir Basil Liddle Hart raportas pri tio la ateston de germanaj generaloj, kiujn li havis la okazon demandi post la dua mondmilito : "Ilia atesto - li skribis - emis montri, ke la formoj de perforta rezistado efikis sufiĉe por havigi al ili malfacilaĵojn, nur en dezertaj aŭ montaraj regionoj, kiel en Ruslando kaj en la Balkanoj. Ilia atesto montris ankaŭ la efikecon de la neperforta rezistado... Aperis ankoraŭ pli klare, ke ili ne kapablis kontraŭstari ĝin. Ili estis spertuloj de perforto, trejnitaj por kontraŭstari kontraŭantojn uzantajn perforton. Antaŭ aliaj formoj de rezistado, ili troviĝis konfuzitaj, des pli ke la uzataj metodoj konservis econ subtilan kaj kaŝan. Ili estis senpezigataj, vidante la rezistadon perfortiĝi." (30)

Ni aldonu, ke, okaze de ekstrema danĝero (provo de amasa deportado, ekzemple)la neperforta defendo ne malpermesus turni sin al nemurda sabotado, tiel ke oni senmovigus la transportilojn sen doni al la okupadaj soldatoj la senton de minaco kontraŭ iliaj personoj.

Sed la neperforta taktiko estas ne nur defenda. Ĝi entenas ankaŭ ofensivan aspekton.

La milita defendstrategio, kiu rebatas per armila perforto al la invadaj trupoj, plifortigas - pro la memkonservemo, kiun ĝi paroksismigas ĉe ili - la hierarkian ĉenon, kiu unuigas tiujn trupojn kun ilia registaro. Ĝi iel cementas la unuecon inter la armeo kaj la agresa ŝtato, kaj ankaŭ inter la armeo, la ŝtato kaj la popolo de la agresa lando. Tiel, la bombadoj al la malfermitaj urboj kreas teroron, kiu tute ne fortranĉas la landanaron disde ties registaro, sed male proksimigas ĝin al tiu. La landanaro tiam vidas la registaron kiel sian solan protekton.

Male, la neperforta taktiko malplifortigas la unuecon inter la agresa ŝtato kaj la individuoj, el kiuj konsistas ĝia armeo, senigante tiun unuecon je la cimento de la timo. La celo estas konsciigi la armeanojn de la kontraŭa

-------

(29)okupado kun kampanjo de protestado kaj notinde de manĝostrikoj, la sovetaj judoj akiris la rajton elmigri al Izraelio.

(30) The Strategy of civilian defence. - Londono : Faber and Faber, 1967 - p. 205.

ŝtato, ke ili nenion riskas kiel personoj, ke nenia malbono estos farata kontraŭ ili, sed ke oni sisteme kontraŭos ilin per la plej firma oberifuzo ĉiufoje, kiam ili agos kiel perantoj de la ŝtato, kiu sendas ilin.

Tia sinteno havas veran korodan povon. La invadita landanaro fariĝas, por la menso de la trupoj, acidbano, en kiu neniu registaro povas permesi al si trempi pli longe sian armeon, pro timo suferi gravajn malplezurojn ĉe la reveno de la soldatoj en sian landon.

Tiel, dum la invado al Ĉeĥoslovakio, la ŝtatoj de la Varsovia Pakto devis rehejmigi trupojn tute malkuraĝigitajn pro la neperforta rezistado, kiun ili renkontis.

Sed Danio estas la loko, kie la rezultoj de la neperforta rezistado ĉe la germanoj mem estis plej mirindaj. En aŭgusto 1943, Himmler decidas ekzorgi pri la "juda problemo", kies solvo, laŭ li, atendis delonge. Sed, skribis Hannah Arendt, "li ne antaŭvidis, ke la germanaj responsuloj, kiuj loĝis en Danio jam de jaroj, ne plu estis la samaj homoj ! Generalo von Hannecker, milita regionestro, rifuzis meti siajn trupojn je la dispono de la plenrajtigito de la germana Imperio, doktoro Werner Best; plurfoje la specialaj SS-trupunuoj senditaj al Danio, la Einsatz Kommando, protestis kontraŭ "la ordonoj de la centraj agentejoj", laŭ la atesto de Best en Nurenbergo. Kaj Best mem oni ne plu povis fidi, kvankam en Berlino oni neniam sciis, ĝis kia grado li fariĝis "neresponsa". La oficejo de Eichmann sendis al Danio unu el siaj plej taŭgaj homoj, Rolf Günther, kiun neniu povis akuzi pri manko de "senkompata malmolkoreco". Günther neniel imponis al siaj kolegoj de Kopenhago. Kaj jen Hannecker mem rifuzis dekreti, ke la Judoj kontrolmarku, kiam ili iras al la laboro ! Best iris al Berlino kaj akiris la promeson, ke ĉiuj Judoj de Danio, kia ajn estas ilia kategorio, estos deportataj al Theresienstadt (31).

El nazia vidpunkto, tio estis gravega cedo.

Oni decidis, ke la Judojn oni kaptos kaj tuj evakuos dum la nokto de la 1a de oktobro. En la haveno la ŝipoj estis pretaj. Ĉar oni povis fidi nek la Danojn, nek la

-------

(31)Urbo en Ĉeĥoslovakio, kie la nazioj arigis en getto, por reklamaj celoj, la israelidojn, kies konateco malhelpis, ke oni povu mortigi ilin.

Judojn, nek la germanajn trupojn de Danio, necesis enporti policunuojn el Germanio por efektivigi la serĉadon de la Judoj, domon post domo.

Lastatempe, Best informis tiujn policanojn, ke ili ne rajtas frakasi la pordojn, ĉar tiam la dana polico povus interveni. Nu, ambaŭ policoj ne devis kontraŭstari unu la alian. La germanaj policanoj do povis kapti nur la Judojn, kiuj propravole lasis ilin eniri. El tuto de pli ol 7800 Judoj, la germana polico trovis tre precize 447 homojn hejme kaj pretajn malfermi sian pordon.

Tial, ĉar kelkajn tagojn antaŭ la fatala dato germana transportisto, Georg F. Duckwitz, probable informita far Best mem, malkaŝis ĉiujn germanajn projektojn al oficistoj de la dana ŝtato. Politike kaj psikologie, la plej interesa aspekto en tiu okazaĵo estas la sinteno de la germanaj aŭtoritatoj en Danio. Okulfrapas, ke ili sabotis la ordonojn de Berlino.

Laŭ tio, kion ni scias, daŭrigas Hannah Arendt, tio estas la nura okazo, kiun havis la nazioj por taksi la malkaŝan rezistadon de la enloĝantaj landanaroj. Kaj ŝajnas, ke tiuj el la nazioj, kiuj konstatis ĝin, simple ŝanĝis sian opinion; ke ili mem fine kredis, ke ekstermado de popolo ne estas memkomprenebla. Renkontante principan rezistadon, ili vidis sian "malmolkorecon" fandiĝi kiel butero ĉe la suno, kaj kelkaj nazioj eĉ havis kelkajn voletojn de aŭtenta kuraĝo" (32).

Nu, ankoraŭ tiam, neperforta rezistado estis improvizita far landanaroj neniel preparitaj por ĝi.

Oni rajtas opinii, ke popolo pretigita por la praktikado de neperforto konsistigus timigan danĝeron por la menso de invada armeo. Estus ĉiel tre riske ordoni al tiu armeo kruelan punagadon.

Sed la neperforta agado ĝuste celas devigi la kontraŭulon aŭ puni aŭ toleri. Se li toleras, li ridindiĝas kaj ŝajnas montri sian malforton. Se li volas puni, li stariĝas kontraŭ landanaro rezoluta en sia malobeemo, kaj li devas turni sin al grava nombro da armeanoj kaj policanoj,

-------

(32)ARENDT Hannah - Eichmann à Jérusalem - Gallimard - (Collection Témoins).

kies ideologia kontrolo estas des pli malfacila, ke ili estas en konstanta kontakto kun landanaro amikema, ĉiam preta por la dialogo, sed samtempe firme rezoluta en sia oberifuzo.

Resume, la landanaro devas konservi la iniciativon kaj devigi la kontraŭulon uzi minacon, samtempe maleblig-ante al li efektivigi tiun minacon.

Se veras, ke neperforta agado kelkfoje necesigas heroecon, estus malprave konkludi el tio, ke ĝi estas praktike atingebla nur de malplimulto.

Ekzistas fakte diversaj ŝtupoj en la neperforta lukto. Iuj agadformoj povas esti efike uzataj nur de grupoj trejnitaj por iri ĝis la fino. Temas pri agadoj de interveno aŭ nekunlaborado, kiuj supozigas rektan kontraŭstaradon de la malamiko, aŭ entenas seriozan riskon por la uzantoj (sidado, obstrukco, manĝostriko, laborista kontrolo, nemurdaj sabotadoj, kiuj povas akompani la neperfortan rezistadon en kazoj de ega danĝero).

Sed la neperforta agado entenas tutan gamon de tre efikaj agoj, inter kiuj kelkaj estas grandparte anonimaj.

Ekzemple, la "hartalo", tago de ĝenerala striko, kiam la landanaro estas alvokita senhomigi la laborejojn, la stratojn, la amuzejojn, kaj resti hejme; la resendo de titoloj kaj ordenoj, gesto baze simbola; la bojkoto, per kiu la aĉetpovo de la konsumantoj fariĝas vera socia povo, kontraŭanta la povon de la malamiko; la kolektiva, tuta aŭ parta rifuzo de la imposto.

Ankaŭ de ĉiuj estas atingeblaj multaj formoj de civila protestado, kies eco ĝenerale estas simbola, sed kies rezulto estas subteni la rezistemon de la landanaro. Ekzemple, komence de la germana okupado, la norvegoj esprimis sian unuecon kontraŭ la okupanto per insignoj, kiujn ili surportis, ĝis la registaro ekkonsciis pri ilia signifo. La okupantoj tiam fariĝis devigataj puni la surporton de paperagrafoj ĉe la butontruo. Tia punado ridindigis ilin kaj plifortigis la unuecon de la landanaro.

La plej granda risko en tia rezistado estus la provoko: atenco (aŭ pseŭdo-atenco) kontraŭ la okupantaj trupoj aŭ kontraŭ la landanaro, por ke tiu lasta perforte ribelu, kio ebligus poste senkompatan punon. Sed la rezistado kontraŭ provoko estas parto de la rudimentoj de la neperforta

disciplino.

Por civitano incita al la neperforto, atenco kontraŭ la malamikaj trupoj estas perfida ago, kiun povus sekvi funebraj manifestacioj, por konfirmi, en la menso de la soldatoj, la senton, ke ili estas neniel malamataj *kiel homoj*.

Same, ĉian perforton kontraŭ la landanaro sekvus amasmanifestacioj, kaj ĉefe *ĉiu devus bone konscii*, *ke*, *eĉ se la neperforta rezistado devus kosti homajn vivojn* - kion oni ne povas ekskludi - *ĉia perforta rezistado ja kostus ankoraŭ pli multajn*.

Certe, tia rezistado ne povas, cetere samkiel la milita rezistado, certigi tujan sukceson. Sed estas malfacile imagi, kiel ĝi povus havi rezultojn tiel katastrofajn kiel havus perarmila defendo. La konsekvencoj de la ŝajna malsukceso de la neperforta rezistado en Ĉeĥoslovakio estas neniel kompareblaj kun tiuj, kiujn estus havintaj perarmila rezistado. Temis tamen pri improvizita rezistado. Nu, en tiu lando, ne povis okazi la korpa forigo de la kontraŭantoj al novstalinismo; la landanaro estas ankoraŭ malfavora al la okupantoj, kaj ne estas dubo, ke la "praga printempo" iam refloros. La soveta koloso estis ege ŝancelita, la rezistado de la intelektuloj pliviglîĝis malgraŭ la subpremado, kaj la subteno de la alilandaj komunistaj partioj iĝis multe malpli senkondiĉa.

Krome, kiel agnoskas Michel Tatu en "Le Monde" (1973/08/27), "la formo de neperforta rezistado, kiun spontane adoptis la landanaro, estus povinta pludaŭri multe pli longe kaj konduki al tre malsama situacio, se la gvidantoj ne estus propravole finigintaj ĝin per politiko de kunlaborado, kiu sinonimas kapitulacon". Se la sestaga neperforta rezistado de Ĉeĥoslovakio sufiĉis por estigi malfacilaĵojn al la soveta ŝtato, oni povas imagi la efikon, kiun povus havi neperforta rezistado taŭge preparita dum jaroj far landanaro memstara kaj konscia pri tio, kion ĝi volas defendi.

c) *Post la milita okupado*

Kontraŭ kolektiva neperforta rezistado, tiel danĝera por la menso de la armeo kiel por la fameco de la agresinta ŝtato - rezistado, kiu malebligus al tiu ŝtato venigi la lukton sur militan terenon kaj konstante retirus

ĝin sur la politikan kaj moralan kampon - la taktiko de la invadinto sendube konsistus en starigado de kunlabora registaro, kiun ĝi komisius por la "konservado de la ordo".

La rezistado tiam iĝus nura interna politika luktado, al kiu la neperforto liverus sian spiriton kaj siajn teknikojn. Tia lukto povus konsisti, ekzemple, en la starigado de tre malcentralizitaj kontraŭregistaroj, kiuj klopodus mem prizorgi la bezonojn de la landanaro kaj tiel ebligus bojkoti la kunlaboran registaron.

3. Necesaj kondiĉoj

Samkiel la perarmila defendo, ankaŭ la neperforta defendo evidente ne povas esti improvizata. Ĝi postulas seriozan preparadon kaj ne povus atingi sian plejan efikon en la nuna stato de nia socio.

Kvar kondiĉoj ŝajnas nepre necesaj por la realigado de tia defendo, kvar kondiĉoj kunligitaj, ĉar la realigado de la unua progrese sekvigas tiun de la tri ceteraj per la efiko mem de la neperforto.

a)La neperforta rezistado bezonas landanaron bone informitan pri la principoj kaj metodoj de la neperforto.

Tiu informiteco devus esti samtempe teoria (scio pri la grandaj principoj de neperforto kaj pri la antaŭaj agadoj) kaj praktika (trejnado al la diversaj metodoj, rezistado kontraŭ provokoj, ktp).

La studado de la neperforto havus sian lokon en la lernejoj, la gimnazioj, la liceoj, la universitatoj dum ĝia praktiko estus instruata en la aktiva vivo far grupoj jam konvinkitaj kaj informitaj. Tia instruado necesigas pedagogiajn metodojn, kiuj alvokus ĉefe la responsemon, la solidaremon kaj la kreemon de la lernantoj kaj de la studentoj.

Tiu tuta informklopodo fine celus provizi la landanaron per neperfortaj armiloj kaj tiel senarmeizi, malcentralizi, "civiligi" la defendon.

b)La realigado de tiu unua kondiĉo favorus progresive la realigadon de la dua, nome, la rekaptado,far la individuoj kaj la lokaj komunumoj, de granda parto el ties politika respondeco ĝis nun donita al la ŝtato.

La praktikado de neperforto postulas scion pri la politikaj kaj ekonomiaj mekanismoj de la lando. Tiu scio estu nete supera al tiu, kiun nuntempe havas la plimultaj Francoj. La civitanan pasivemon de la plimultaj Francoj grandparte kaŭzas profunda sento de senpoveco kaj malinklino kontraŭ la politiko. Ĉar ĝi donas efikajn agrimedojn, la neperforto redonas al la politiko ĝian veran sencon kaj ĝian noblecon, kaj iĝas potenca rimedo por formi la civitanojn. La formado al neperforto estus samtempe informado kaj civitana edukado, kaj tio ekster ĉia politika aŭ ideologia kondiĉado.

Nu, popolo posedanta realan senton pri sia responseco kaj kutimigita al neperforta agado estus, por invadonto, timiga kontraŭanto kaj konsistigus veran "malkonsilan forton".

c)Unu el la plej gravaj obstakloj kontraŭ la realigado de neperforta rezistado estas la socia maljusto kaj la malegaleco de la vivniveloj, regantaj en la plimultaj landoj, ekzemple en Francio. Estas malfacile imagi, kiel ekspluatataj laboristoj povus senti sin reale solidaraj kun siaj ekspluatantoj.

Nu, la solidaremo estas nepra kondiĉo de la neperforta agado. Aliflanke, ĉu necesas atendi la starigadon de senmanka socia egaleco por konsideri la eblecon rezigni la armilarojn kaj sin turni al la neperforta defendo ? Tiu solvo ŝajnas des malpli konsilinda, ke la elspezoj de la vetarmado kontribuas nesolvebligi la sociajn problemojn.

Ankaŭ ĉi tie necesas kalkuli kun la dinamismo de la neperforto. Tiu fakte donas al la ekspluatatoj agrimedojn, elprovitajn en la sociaj luktoj.

La ĝeneraligado de la neperfortaj agadmetodoj kreskigus la efikecon de la sindikata agado kaj ebligus redukti la diferencojn inter la salajroj kaj la vivniveloj.

Aliflanke, la edukado al neperforto kaj la politika konsciiĝo, kiu sekvus ĝin, havus sendube kiel rezulton favori la helpon al la plej malfavorataj klasoj far la mezaj klasoj (33), kaj pliefikigi la batalon por justo

---

(33)Noto de la verkintoj: Pri la efikeco de la neperforta agado en sindikataj luktoj kaj en la publika opinio, legu "Cesar Chavez", franclingvan broŝuron mendeblan al: Communauté non-violente d'Orléans, 50 rue d'Illiers, F 45000 Orléans.

../...

kaj por socio, en kiu la perspektivoj estu pli egalaj.

Male de tio, kion oni ofte opinias, la decido rezigni la perforton povus havi efikon multe pli liberigan ol inhibician. La timo, ke la konfliktoj degeneru, blokas multajn iniciatojn, kiuj povus esti fekundaj, kaj samtempe senigas la depostulajn movadojn je helpoj, kiuj necesus al ili.

Tial, dum la armeo funkcias oftege kiel ilo de la potencularo kaj monposedantaro, la metodoj de neperforta agado estas ilo servanta la popolon, kontraŭ la troigoj de la potencularo kaj monposedantaro.

ĉ)Lasta, nepre necesa kondiĉo : ekstera politiko reale paca, kio necesigas :

- unuflanke, la rezignon al ĉia defendpolitiko bazita sur la milita teroro kaj sur vetarmado, samkiel al ĉia formo de imperiismo kolonia aŭ novkolonia.
- aliflanke, la transformon de la militindustrioj en civilajn industriojn; la ĝustaprezan aĉetadon de la krudmaterialo produktata de la landoj de la Tria Mondo; la akcepton kaj formadon de la alilandaj laboristoj, tiu formado ebligus al ili, post sia reveno hejmen, labori por la disvolviĝo de siaj propraj landoj.

La kreado, per tiuj rimedoj, de internacia reto de interkrucigitaj simpatioj, malfaciligus la klopodon de registaro, kiu strebus havigi al si popolan subtenon por militema politiko, kaj favorus la pacan solvadon de eventualaj konfliktoj.

En Francio, tia aliigado de la ekstera politiko ne povus efektiviĝi sen internaj luktoj, pro la nunaj elektoj de la registaro (frappotenco, armilvendado, ktp...) . En

-------

(33)Noto de la trad.: la broŝuro de la komunumo de Orléans estas 25-paĝa informilo verkita jam de kelkaj jaroj. Post la eldono de la originalo aperis alia broŝuro, pli kompleta, pri la sama temo. Ĝi nomiĝas ankaŭ "Cesar Chavez" entenas 100 hektografitajn kaj agrafitajn paĝojn, kostas 10 FF + sendkostojn kaj estas mendebla al : F. Thomazo, 15 rue E. Varlin, F 77290 Mitry Mory. Ambaŭ broŝuroj estas franclingvaj.

tiu lukto kontraŭ la vetarmado kaj en la lukto por la socia justo povus do komenciĝi, jam komenciĝis, la eksperimentado de la neperfortaj metodoj. La neperforta rezistado kontraŭ invado prepariĝas ĉi tie kaj nun per la rezistado kontraŭ politiko de defendo kaj sociaj strukturoj fundamente kontraŭaj al justo kaj paco.

d) Oni povas demandi sin, ĉu la sinturno al la neperfortaj metodoj ne postulas, kiel antaŭan kondiĉon, la aliĝon al spirituala doktrino bazita sur memofero, frateca amo kaj sur ĉiuj valoroj, kiuj estas interalie la propraĵo de la kristana religio. Oni volonte aludas pri la sankteco de Gandhi kaj pri la laŭdira "kunnaskita neperforto" de la Hindoj, kio klarigus la sukceson de la neperforta malkoloniado de Hindio. Alivorte, la neperfortaj metodoj estus atingeblaj nur de tiuj, kiuj "kredas al la ĉielo".

Efektive, la studado de diversaj neperfortaj kampanjoj ĝis hodiaŭ okazintaj ŝajnas montri du aferojn :

- unuflanke, kiel ni diris komence, kampanjoj de neperforta agado povas sukcese okazi en ege diversaj kulturaj medioj. Se veras, ke neperfortajn luktojn gvidis homoj, kiujn animis, aŭ animas, profunda spiritualeco (Gandhi, Martin Luther-King, Cesar Chavez, Danilo Dolci kaj multaj aliaj), ankaŭ veras, ke aliaj neperfortaj luktoj, inter la plej malmildaj (Danio, Norvegio, Ĉeĥoslovakio) estis kondukataj far landanaroj, kiuj ne povis sin turni al aliaj rimedoj, kaj do sen eksplicita spirituala referenco. Tiuj kampanjoj ŝajne ne havis pro tio malpli grandan efikon.

- aliflanke, ŝajnas ke la daŭro kaj la disvolviĝo de ĉiuj tiuj neperfortaj luktoj estis certigataj per la komuna rezistvolo de la landanaroj, volo, al kiu la neperforta agado donis repage sian propran dinamismon. Nu, tiu manifestado de homdigno, kio estas ribelo de popolo aŭ de malplimulto kontraŭ la maljusto kaj la subpremo, kaj la akceptado sinoferi, kiu estas nedisigebla de tiu ribelo, sendube konsistigas, kun la tuta fasko de travivitaj valoroj, kiujn ĝi implicas, la veran spiritualan kondiĉon por la neperforta agado, kondiĉon, kiu ĝerme entenas ĉiujn aliajn valorojn.

Sed tiu rezistvolo povas, estas vere, eliri tiel al perarmila rezistado, kiel al neperforta. Diversaj estas la kialoj, kiuj povas inklinigi popolon al neperforta rezistado. Ili povas esti spiritualaj, moralaj aŭ homamaj. Sed ili povas deveni ankaŭ, kiel en la ĉi-supre elvokitaj kazoj, de la neebleco elekti. En la kazo de la hodiaŭa Francio, la kialo povus esti la konsciiĝo pri la neefikeco de perforto, post meza aŭ mallonga tempo, por certigi la pacon, pro la nepra kunĉenado, kiun atestas la vetarmado kaj la armilkomerco.

La principo de Gandhi, laŭ kiu "la celo estas en la rimedoj, same kiel la arbo estas en la semo", povas esti fakte tiel objektiva konstato pro nura sana prudento, kiel morala regulo. Ni aldonu, ke, por popolo kutimigita al neperforta agado, la konfido en la luktorimedoj, kiujn ĝi liveras, povus esti decidiga ĉe la elekto de metodo por rezisti al invado.

Certas, ke longdaŭra neperforta lukto povus esti gvidata nur far homoj, ne nur konsciaj pri la justeco kaj vereco de sia afero, sed ankaŭ kapablaj komuniki sian konvinkon al granda parto de siaj kontraŭuloj kaj de siaj aliancanoj, en la multaj dialogoj kaj alfrontiĝoj, kiujn postulas tiu formo de lukto. Ĉar, kontraŭe al la perarmila lukto, kiu povas utili por defendi iun ajn aferon, inkluzive kaj prefere la plej malbonajn, la neperforta lukto estas adaptita nur al la defendo de reale justaj aferoj.

Ŝajnas do, ke oni povas aserti, ke la uzado de la neperfortaj rimedoj postulas kiel moralan kaj spiritualan ekagilon, la firman volon defendi justan aferon. El tiu neredukteбla minimumo, ĉiu komunumo, ĉiu popolo povas alvoki siajn proprajn moralajn valorojn kaj ĉefe tiujn, kiujn ĝi kunhavas kun sia kontraŭanto.

Ĉar la franca socio distingiĝas samtempe per kristana tradicio kaj per revolucia tradicio, ne estas kialo por dubi, ke ĝi disponas en siaj propraj heredo kaj kreemo moralajn riĉofontojn sufiĉajn por starigi kaj efike uzi sistemon de neperforta defendo. La preparado al la popola neperforta defendo eĉ entenas kuraĝigon por ĉiu, pliprofundigi kaj disvolvi la moralajn valorojn proprajn de sia tradicio filozofia, politika aŭ religia.

# Konkludo

A) Fine de ĉi tiu studo, ŝajnas eble konsideri akiritaj jenajn punktojn :

1. La perarmila defendo, kia ajn estas ĝia formo, havas sur la nacia kampo kaj sur la tutmonda kampo tre gravajn domaĝojn politikajn, ekonomiajn, ekologiajn kaj moralajn. Tiuj mem, kiuj rekomendas ĝin, ne kaŝas, ke ĝi estas malbono, sed - ili diras - necesa malbono, "plej eta malbono".

2. Kontraŭe al kutima opinio, la perarmila defendo vere ne sukcesas sekurigi la teritoriojn kaj landanarojn, kiujn ĝi supoze devas protekti; ŝajnas, ke nur tre esceptaokaze ĝi sekurigas ilin. Krome, pro la vetarmado kaj la nuklea multiĝado, ĝi emas pligravigi la riskojn de milito, do de agresado.

3. Per la civila neperforta defendo senarmilaj popoloj povis efike defendi siajn rajtojn kontraŭ senkompataj malamikoj, kvankam ilia neperforta rezistado estis improvizita.

Tiuj konstatoj pensigas, ke estus multe pli racie celi la starigadon de civila neperforta defendo, ol daŭrigi la plifortigadon de perarmila defendo.

Fakte ni kredas, ke landanaro rezoluta sin defendi draste povus ne nur malhelpi al eventuala agresanto noci, per inhibicia efiko al la agres- kaj subprem-kapablo de ties soldatoj kaj policanoj, sed eĉ malkonsili al li aŭdaci invadon, pro la timo, ke la "kuraĝo" de liaj trupoj povus fandiĝi ĉe la kontakto kun landanaro tute preta kunfratiĝi sed ribelanta kontraŭ ĉia enregimentiĝo, ĉia submetiĝo kaj ĉia ago kontraŭa al ĝiaj konvinkoj.

Krome, dum la starigado de potencaj sistemoj de perarmila defendo kreskigas la riskojn de totalismo, pligravigas la ekonomiajn malegalecojn, partoprenas en la difektado de nia ekologia ekvilibro kaj endanĝerigas la moralajn valorojn plej elementajn, la neperforta rezistado donus samtempe viglon kaj efikajn rimedojn por lukti kontraŭ tiuj danĝeroj dum pacotempo. Fakte, fronte al la danĝeroj de totalismo, kiu emas "atomigi" la socion kaj izoli la individuojn, la

neperforto estas fermento de komunikado kaj solidaro; ĝiaj agrimedoj povus esti tiom efikaj kontraŭ interna diktaturo, kiom kontraŭ alilanda invadanto. Agadoj similaj al tiu de Cesar Chavez en Kalifornio montris, ke ekspluatataj malplimultoj povas defendi sin efike per la neperfortaj rimedoj kontraŭ la plej potencaj malamikoj. Fine, la neperforto estas ne nur akordigebla kun la bazaj moralaj valoroj (solidaro, justosento, memoferemo), sed ĝi ankaŭ emas disvolvi ilin per dialogoj samtempe fratecaj kaj ekzaktaj, kiujn ĝi postulas.

Tial, kiam oni konsideras, ĉu ĝian defendan efikecon, ĉu ĝian liberigan dinamismon, ĉu la forton, kiun ĝi donas al ĉiuj, kiuj luktas por la defendo de siaj pravaj rajtoj, ĉu la moralon, kiun ĝi portas en si, la neperforta defendo ŝajnas prezenti nekompareble pli da avantaĝoj ol la perarmila defendo.

B) <u>Restas precizigende, kiel oni povus transiri de la perarmila defendo al la neperforta defendo.</u>

Tiun demandon oni povas provi respondi teorie, konsiderante la logikon de la neperforto. Sed la verkintoj preferis respondi praktike per jena analizo de la nuntempa situacio de neperforto en Francio :

La logiko aŭ la dinamismo de la neperforto povas malfacile akordi kun regemaj decidoj de la establita povo. Estas malfacile imagi, ke la nuntempa registaro aŭ eĉ maldekstra registaro decidos subite anstataŭigi la perarmilan defendon per neperforta defendo ! La transiro de la perarmila defendo al la popola neperforta defendo sendube povas okazi nur progresive, per la iniciato de la bazo, kaj unue sur loka kampo. Ne estus logike, pri tiu demando, atendi, ke la registaro faros decidojn. La civitanoj mem devas ekresponsi kaj ekrealigi tion, kion ili deziras, tie, kie ili troviĝas. Registaraj decidoj povus helpi por progresi en tiu direkto, sed ili devus sekvi, kaj ne antaŭi, la evoluadon de la publika opinio.

La nuntempa disvolviĝado de la neperforto en Francio ŝajne okazas dumaniere. Unuflanke, preskaŭ ĉie ekzistas grupoj aŭ komunumoj, kiuj fiksis al si kiel taskon vivi kaj diskonigi la neperforton. Aliflanke, oni ofte vidas,

en diversaj luktoj, individuojn, malplimultojn aŭ organizitajn grupojn, kiuj sin turnas al formoj de neperforta agado, sen pretendi eksplicite pro neperfortismo: manĝostrikoj, enkateniĝoj, marŝoj, lupagstrikoj, neperfortaj okupadoj de publikaj konstruaĵoj, subteraj laborejoj dum la striko de Lip, kreado de sovaĝaj institucioj (infanvartejoj, maloficialaj lernejoj, ligoj de produktantoj kaj konsumantoj, ktp). Plurfoje oni vidis neperfortajn grupojn alporti sian teorian kaj praktikan subtenon al tiuj, kiuj batalas, foje senscie, per neperfortaj agmanieroj. Tiaj renkontiĝoj certe povas favori konsciiĝon pri la valoro de la neperforto kiel tuto.

Sed la kreado de vera neperforta defendo postulas, ne nur ke la plimultaj civitanoj sciu, kio estas neperforto, sed ankaŭ, ke ĝi havu senton pri sia respondeco kaj la eblecon reale preni ĝin sur si.

Nu, reala demokratio ŝajnas nepraktikebla interne de centralizita ŝtato kia estas Francio nuntempe, kaj kie ĉiuj povoj (politika, ekonomia, teknika, milita) situas ĉe la supro de piramido el 50 milionoj da landanoj, aŭ eĉ ekster tiu piramido (povo de la multnaciaj societoj, speciale). Tia socia strukturo naskas, kiu ajn estas la estranta partio, profundan senton de senpoveco, la neresponsemon kaj la pasivemon. Ĉiuj bonaj paroloj pri demokratio kaj partopreno nenion povas ŝanĝi.

Ŝajnas do al ni, ke neperforta defendo, samkiel cetere la demokratio, povos stariĝi nur per procezo de malcentralizado en ĉiuj kampoj. La neperforto ĝuste ebligas antaŭvidi formon de malcentralizado, kiu efektiviĝus ne laŭordone, per la supro, sed per la bazo. La nekunlaborado kaj la civila malobeado, kunigitaj kun la kreado de lokaj institucioj sendependaj kaj la pretigado de malpezaj teknikoj aŭ de "kunviveblaj" iloj kontroleblaj de ĉiuj, ebligus realigi, post profunda laboro de konsciigado kaj informado, progresivan liberigadon per la bazo. Tiam eblus konsistigi verajn "liberigitajn teritoriojn", kies administradon ekzorgus la loka loĝantaro.

Tiuj "teritorioj" povus esti aŭ geografiaj, aŭ instituciaj (ligoj de produktantoj kaj konsumantoj, lernejoj, defendo). La ekzemplo, kiun donas al ni la kamparanoj de Larzako, montras, ke tiu hipotezo estas neniel utopia. La

konstruado de "pirata ŝafejo" en la zono de plivastigado de la milita kampo, la renovigo de vojo, la ekkultivado de novalo apartenanta al deputito de la reganta partio, ĉio ĉi montras, ke la civila malobeado povas esti konstruiva (°). Kunordigado inter la "liberiĝintaj" komunumoj (kunordigado iom simila al tiu kreiĝanta inter la loĝlokoj minacataj per la plivastigado de militkampoj) povus plifortigi tiun movadon kaj, en multaj kazoj, devigi la potencularon cedi kaj aliigi la leĝon, aŭ venigi al la regpovo homojn pli favorajn al reala malcentralizo.

Sur la armea kampo, senarmeizado per la bazo estus tre konceptebla : la militrifuzo de la junuloj; la rifuzo far la adoltuloj pagi la parton de la imposto destinitan al la nacia defendo kaj ĝia redono al la komunumo (34); agado de la sindikataj sekcioj lokaj favore al la transformado de la armiluzinoj en civilajn, en direkto favora al la regiona aŭtonomeco : ĉio ĉi kaj ankaŭ multaj aliaj rimedoj imagendaj, konsistigus la praktikajn manierojn por senarmeizi regionon aŭ komunumon kaj "civiligi" ĝian defendon. Tiaj agadoj povus okazi en konstanta dialogo kun la lokaj armeanoj kaj kun iliaj familioj, kiujn oni devus konstante informi pri la celoj de la movado. En transira aŭ definitiva periodo (laŭ la regionoj) la lokaj trupunuoj kaj ties nearmila materialo povus transformiĝi en helpkorpusojn por la kazoj de loka, regiona, nacia aŭ internacia katastrofoj. Ili helpus ankaŭ por la laboroj entreprenitaj surloke por doni al la regiono ĝian ekonomian aŭtonomecon.

Tia povus esti unu el la vojoj por la malcentralizado sur la armea kampo. Ni ne asertas, ke tio okazos. Ni diras nur, ke tio povus okazi, ke la vojo estas malfermita kaj, ke, se personoj aŭ grupoj jam konsciigitaj kaj direktitaj al la malcentralizado eniros tiun vojon, ili povos krei procezon, kiu iĝos realigebla multe pli rapide ol oni kredas, tion, kio nun ŝajnas utopia.

-------

(°)Vidu en "Sennaciulo" de junio 1975 la artikolon "Ni savu Larzakon!" (Noto de la trad.).

(34)Pri tiu temo oni legos kun intereso en la revuo (franclingva) "Alternatives non-violentes",n-ro 3, la raporton pri la agado de Lorezo Barbera kaj de la loĝantoj de la valo de Belice, en Sicilio.

Certe, tia movado trafus multajn obstaklojn, sed la plej gravaj eble ne estas tiuj, pri kiuj oni tuj pensas. La kontraŭstaron de la ŝtato, de la armeo kaj de la ekonomiaj potencoj oni relative facile malefikigus per la neperfortaj rimedoj kaj per la efiko de inhibicio, kiun ili havus ĉe ĉia provo punhaltigi la movadon. La plej granda malfacilaĵo estus krei, ĉe la bazo, vere solidaran movadon, ĉefe en la grandaj urboj, kie la socio estas jam ege "atomigita". La kamparaj komunumoj kaj la urbetoj, tre multaj en Francio, sendube konsistigus bazon multe pli fortikan por tia movado. La Larzaka ekzemplo, ree, montras, kian gradon de efikeco kaj solidareco povas atingi la kamparanoj, kiam ili organizas sin kaj prenas en siajn manojn sian vivmanieron, kaj kian imagkapablon ili povas disvolvi. Estas vere, oni diros, ke ilia kunteniĝo fariĝis kontraŭ preciza danĝero; sed hodiaŭ la danĝero estas ĉie, kaj ofte tre proksima. Ĉu la danĝero de polucio ne kunagas por instigi transformiĝon de la mensoj, kies rezultoj jam videblas ?

Ekkonscio pri tiuj danĝeroj, kiu ne finvenus al nea pesimismo, kaj kiu male kuniĝus kun la progresiva konstruado de socio, kie la rilatoj inter la homoj kaj kun la natura medio estus malsamaj, povus esti potenca, vigliga elemento. En tiu procezo la starigado de civila neperforta defendo havus gravan lokon, kaj la neperforto mem donacus siajn agrimedojn.

Devas esti klare nun, ke tio, kion ni proponas, ne estas ĝustadire procezo de senarmigado, sed pli ĝuste, laŭ la dirmaniero de Adam Roberts, procezo de "transarmado", t.e. vojo por transiri de formo de defendo al alia formo de defendo, evoluado nedisigebla de la transiro de formo de socio al alia formo de socio.

Gravus, ke tiu transiro efektiviĝu plejeble per intima kunordigo kun la aliaj popoloj : ĝemeligado de komunumoj, kreado de vera internacia civilservo, bazita sur memvolo, kiu ebligus al la junuloj, kiuj dezirus tion, iri por labori al aliaj landoj, kulturaj interŝanĝoj... ĉio ĉi kun plifortigado de la ligo, ĉe la bazo, inter la popoloj, kontraŭbatalus la naskiĝon de movadoj naciistaj, fremdofobiaj kaj militemaj.

° ° °

Noto de la trad.: La verkintoj konkludas sian analizon per tiu alvoko al siaj francaj legantoj :

"Al la konvinkita leganto ni estas pretaj proponi serion de agadoj, kiuj ebligus al li, laŭ la tempaj kaj monaj rimedoj kaj laŭ la kapabloj, kiujn li disponas, partopreni en la kreado de vera neperforta movado en Francio (35). Jam nun, tiuj, kiuj deziras partopreni en la diskonigado de ĉi tiu studo (°) povas peti de ni ekzemplerojn de la flugfolio, kies tekston ili trovos ĉi-poste (36). Ĉiu devas esti bone konvinkita, ke la konservado de perarmila defendo, kun ĉiuj danĝeroj, kiujn ĝi entenas, aŭ la orientiĝo al neperforta defendo kaj socio, en kiu la interhomaj rilatoj ebligos realan floradon de la individuoj, dependas fine de ĉiu el ni."

C)<u>Kion povas fari la leganto</u> ?

La verkintoj fakte ne volis doni konkludon al sia studo. Male, ili deziras, ke ilia broŝuro donu al la leganto okazon, ĉu por ekdialogo, ĉu por klopodo por informi sin kaj eble agi.

Se li ne estas konvinkita, se li radikale kontraŭstaras kion ili proponas, aŭ se li demandas sin, ŝajnas tamen dezirende, ke li akceptu ekdialogi kun ili.

Ili opinias ke, kiu ajn estas la formo de defendo, kiun adoptos ilia lando, ĝi estos sana kaj efika, nur se ĝi rezultos el malkaŝa kaj rigora dialogo inter la Francoj, kaj ankaŭ se ĝiaj celoj estos komprenitaj kaj akceptitaj de la plimulto. Ne ŝajnas al ili, ke tio estas nun la kazo en Francio. Tial, se la kritikoj faritaj al ilia studo estos multaj kaj precizaj, ili eble publikigos broŝuron, kie estos troveblaj la ricevitaj kritikoj kaj la respondoj , kiujn ili proponas.

Sed ili ankaŭ devontigis sin respondi persone al ĉiuj legantoj, kiuj skribos al ili. Tial, ĉar ili konscias pri la neceso de kunordigo kun la aliaj popoloj, ili certe ŝatus koni ankaŭ la reagojn de la nefrancaj legantoj de ĉi tiu esperanta broŝuro kaj certe konsentos respondi al ili.

Sendi ĉian kontraŭdiron, demandon aŭ sugeston al :

Centre Local Non-Violent de Toulon, 15 avenue Vauban,
F 83100 TOULON.

-------

(35) Vidu pri tio la trian aldonaĵon.

(°)Temas pri la originala broŝuro, en franca lingvo (Noto de la trad.).

(36) Noto de la verkintoj : Tiu flugfolio celas efiki kiel ekkonsciigilo. Vi povas, aù sendi ĝin al viaj amikoj, aù meti ŝin sub la viŝilojn de la veturiloj (kelkaj personoj povas rapide zorgi pri tuta kvartalo aù pri la centro de urbo). Tiu flugfolio entenas lokon, kie vi povas laùvole indiki vian adreson aù la adreson de via grupo, kio ebligus al vi rilati kun la personoj en via loĝloko, kiuj interesiĝas pri tiu problemo. Prezo de la flugfolio : 7 FF po cento, inkluzive sendkostojn. Sendu la mendojn al : CLICAN, 15 avenue Vauban F 83100 Toulon.
Noto de la tradukintino : traduko de ĉi tiu flugfolio estas aldonita al ĉi tiu broŝuro.

Unua aldonaĵo : Sir Basil Liddle Hart

# Civila rezistado

(El la kolektiva verko : "The Strategy of civilian defence", Faber and Faber ltd, Londono)

(Noto de la verkintoj : Ŝajnis al ni grave, aldoni al nia studo la tradukon de la artikolo, kiun Sir Basil Liddle Hart verkis pri la civila defendo. Liddle Hart, brita kritikisto kaj milita teoriisto, havigis al si per sia akravido internacian famon. Lia studo estas unu el la signoj pri la intereso, kiun oni montras en la anglo-saksaj landoj pri tiu defendmaniero, kiun la plimultaj Francoj malestimas aŭ tute ne konas.

Tamen la leganto rapide ekkonscios, ke la vidpunkto de Liddle Hart diferencas pri multaj punktoj de tiu, kiu estas prezentita en nia studo. Ekzemple, ne ŝajnas al ni evidente, ke la germanaj generaloj estis pli "stampitaj per humanismo" ol iliaj sovetaj kolegoj, kaj ke ili ĉiam trovis malfacile "montri sin tiel senkompataj, kiel postulis la principoj de la perarmila lukto". La efiko de la neperforta rezistado ĉe la generaloj aŭ gvidantoj de agresaj ŝtatoj cetere ne estas la nura elemento, kiu ludas rolon en civila rezistado; Liddle Hart mem insistas pri la graveco de la rektaj kontaktoj inter armeo kaj landanaro. Ŝajnas al ni kontestebla ankaŭ la aserto, laŭ kiu "nearmita forto dependas de siaj malfortaj elementoj"; kvankam estas evidente dezirinde, ke ĉiuj rezistantoj manifestu la plej grandajn forton kaj heroecon, la ĉeesto de kunlaborantoj en la landanaro ne senmovigas la neperfortan rezistadon : ekzemple, tiu de la norvegaj instruistoj okazis sub kunlabora registaro. Fine, ŝajnas al ni kontesteble, prezenti kiel unu el la plej bonajn rimedojn de rezistado, la ruzaĉon kaj duonkunlaboradon kaj pensi uzi la neperfortan rezistadon kiel lastan rimedon post la malsukceso de la perarmila rezistado.)

o o
o

Demandante la germanajn generalojn post la dua mondmilito, mi havis okazon kolekti iliajn atestojn pri la diversaj formoj de rezistado, kiujn ili renkontis en la okupitaj landoj. Tiuj atestoj emis montri, ke la perfortaj formoj de rezistado ne sufiĉe efikis por havigi al ili gravajn malfacilaĵojn, krom en la dezertaj aŭ montaraj regionoj, kiaj Ruslando aŭ Balkanoj, kie la topografio favoris la gerilajn agadojn. En la ebenaj kaj dense loĝataj regionoj de la okcidenta Eŭropo, tiaj agadoj levis problemojn nur kiam la aliancaj armeoj kapablis praktiki samtempan premadon.

La eldiroj de tiuj generaloj malkaŝis ankaŭ la efikon de la neperforta rezistado tiel, kiel ĝi estis praktikata en Danio, en Nederlando, en Norvegio kaj, iom, en Francio kaj Belgio. Laŭ siaj propraj diroj, ili ne kapablis kontraŭstari ĝin. Ili estis spertuloj de la perforto kaj estis trejnitaj por alfronti kontraŭantojn uzantajn perfortajn metodojn. Sed aliaj formoj de rezistado konfuzis ilin kaj tio des pli, ke la uzitaj rimedoj estis subtilaj kaj sekretaj. Ili estis senpezigitaj, kiam la rezistado perfortiĝis kaj kiam al la neperfortaj metodoj alkuniĝis gerilaj agadoj. Ĉar tiam estis pli facile apliki severajn rimedojn de punhaltigo kontraŭ ambaŭ formoj de rezistado.

Oni tamen agnosku - tion oni ne ĉiam faris objektive - ke la germanaj generaloj estis influataj en sia konduto pro la tradicio relative stampita per humanismo, en kiu ili estis trejnitaj. Ili sentis malfacilon por montri sin tiel senkompataj, kiel emis postuli la logiko de la perforto kaj strikta aplikado de la principoj de la perarmila lukto. Nepre necesas konsciadi pri tiaj inhibicioj, kiam oni volas pripensi la neperfortan rezistadon.

Tiu pruvis refoje sian efikecon kaj eĉ akiris kelkajn gravajn sukcesojn. Sed ĝiaj subtenantoj emas malatenti la fakton, ke ĝiaj ĉefaj sukcesoj estis akiritaj kontraŭ malamikoj, kun kiuj la rezistantoj havis komunan kodon de moralo, kaj en kies bazaj valoroj ili partoprenis. Pro tio, la krueleco de la subpremado estis limigita. Estas tre dubinde, ĉu la neperforta rezistado povus havi ian sukceson kontraŭ la iamaj tataraj konkerintoj, aŭ, pli freŝdate, kontraŭ Stalin. La nura efiko, kiun ĝi ŝajne havis ĉe Hitler, estis instigi lin subpremi tiujn, kiuj, laŭ li, mani-

festis nur malŝatindan malforton (1). Sed restas, ke ĝi konfuzis multajn el liaj generaloj , kiuj ricevis pli bonan moralan edukadon. Ĝi ĝenis ilin pli ol povis fari la movadoj de perarmila rezistado en la okupitaj landoj.

Ĝenerale, probable veras, ke eĉ en la kazoj, kiam la neperforta rezistado ne povas rekte efiki al la gvidantoj de malamika lando, ĝi efikas al la menso kaj lojaleco de ĝiaj trupoj kaj de ĝiaj ŝtatoficistoj, kaj konsekvence ĝi povas malrekte efiki, malfortigante la apogilojn de ilia povo.

Gravas distingi inter tio, kio povus esti la neperforta rezistado en interŝtata konflikto kaj tio, kio ĝi estas en interna konflikto, kiu ekzemple kontraŭstarigas al registaro la membrojn de religia grupo aŭ de politika movado havantajn inter si grandan kunteniĝon kaj spiritualan proksimecon. En la unua kazo, ĝi povus havi kelkajn sukceseblojn, nur se realiĝus en la tuta nacio kolektiva disciplino, kunigita kun rezoluteco, kiujn oni neniam vidis en iu ajn armeo.

La efikeco de armeo kuŝas sur valoraj estroj, kiuj povas kalkuli kun kerno da ege trejnitaj trupoj. Sed la efikeco de la neperforta rezistado troviĝas endanĝerigita ekde kiam parto de la komunumo, kiel ajn limigita ĝi estas, ludas la ludon de la kontraŭanto, aŭ pro malforteco, aŭ pro profitamo, aŭ per manifestadoj de agresemo. Oni povas diri, ke armeo dependas de siaj plej fortaj elementoj, dum nearmita forto dependas de siaj plej malfortaj elementoj.

Igi la civilan neperfortan rezistadon tutnacia afero estas ege malfacila tasko. Kio probable plej necesas por ebligi ĝin, tio estas eduki la homojn kaj konvinki ilin, ke ĝi estas realigebla politiko.

Aperas tamen, ke la malfacilaĵoj estas malpli gravaj, kiam tia rezistado estas kondukata "malrekte", pli ol en la perspektivo de malkaŝa kontraŭstaro kaj de sennuanca rifuzo akcepti la postulojn de la okupada povo kaj obei ĝiajn ordonojn. Ŝajna konsento, maskanta strategion de sistema malobeemo kaj partoprenanta en tiu strategio, estas

---

(1)La ekzemploj cititaj en ĉi tiu verko malkonfirmas tiun aserton (vd. p.48/51 kaj 53/55).

multe pli taŭga por konfuzi tiun povon. Se tiun metodon oni aplikas kun rideto kaj mieno de bonvolemulo, kiu eraras pro mallerteco, aŭ ĉar li miskomprenis la ordonojn, tiam la afero povas iri tre malproksimen.

Liberamantaj individuoj ofte adoptis sukcese tiun metodon sub aŭtoritataj reĝimoj. Dum la dua mondmilito, la Danoj, aparte, aplikis ĝin interkonsente kaj grandskale. La Germanoj agnoskis post la milito, ke ili sentis sin trompitaj per tiu rezistmaniero, pli ol per iu ajn alia. En Francio, simila metodo estis adoptita far kaj altaj ŝtatoficistoj kaj industriaj kadruloj, kiuj devis kontraŭstari la postulojn de la Germanoj (ekzemple pri la liverado de provianto). La Germanoj ne povis trovi efikajn rimedojn por kontraŭbatali tiun sintenon. De tempo al tempo, koleregaj, ili postulis la anstataŭigon de tiu administranto, kiun ili suspektis je trompo, sed la posteulo daŭrigis la saman politikon.

Tiuj taktikoj bazitaj sur la prokrastemo kaj ŝajna ĝentileco ne estas heroecaj nek spektindaj rezistmanieroj. Sed kiel pruvis la eksperimento, ili povas aplikiĝi daŭre kaj grandskale, cedante malplejeble al la okupada povo kaj kreante en ĝi pli kaj pli paralizan senton pri trompo. Ne eblas perforte kontraŭstari tiun subtilan rezistmanieron.

Verdire, nenio ebligas kontraŭstari ĝin : vere ekzistas neniu ajn adekvata respondo al tiuj "mildaj" taktikoj. Ju pli ĝeneraliĝinta la agado, ju pli vastaj la regionoj atingitaj, des pli malfacile por kontraŭbatali ĝin, pro la komplikeco de la problemoj starigitaj antaŭ la okupantaj fortoj. Ŝajnas al mi, ke ĉia civildefenda strategio devus baziĝi sur principoj tiritaj el tiuj konstatoj.

Same kiel la gerila lukto, la civila defendo aplikas la principon de la multeco de psikologie ofensivaj agadoj, obligante la homajn kontaktojn kun la okupantaj fortoj. Male al tio okazanta en gerilo, la civila defendo ne dependas de la geografiaj faktoroj. Ĝenerale, ĝi estas des pli efika, ke ĝi estas organizita meze de multhoma kaj densa loĝantaro.

En la neperforta rezistado, tute amikaj kontaktoj povas estiĝi inter la landanaro unuflanke kaj, aliflanke, la militoj, la ŝtatoficistoj, ktp, de la okupanta lando. Per si mem tiuj kontaktoj efikas, kreante situacion, kiu malkvietigas la kontraŭan ŝtaton kaj subfosadas la koherecon

kaj la volkapablon de ĝia dungitaro.

Oni ofte asertas, ke la atombombo estas tio, kio malhelpis la Sovetianojn invadi Eŭropon en la jaroj, kiuj sekvis la duan mondmiliton. Tiu argumento ne konvinkas min. En 1946-47 kaj en la postaj jaroj, kiam la Usonanoj kaj Britoj malmobilizis, la Sovetianoj povus invadi Eŭropon, se ili volus. Kvankam ili ne disponis pri atomarmiloj, ili havis tre fortan militan superecon, kaj necesas memorigi, ke Usono tiam havis nur relative malmultajn atomarmilojn kaj ne posedis H-bombojn. Ju pli mi progresas en la konado de la problemoj, des pli aperas al mi, ke malkonsilis la Sovetianojn la ideo, ke iliaj trupoj miksiĝus kun la okcidentaj landanaroj. La sovetaj gvidantoj timis sian propran popolon, kaj evidentas, ke ilia ĉefa zorgo estis eviti la kontaktojn ebligantajn al la soldatoj de Sovetio kompari la vivkondiĉojn oriente kaj okcidente. Tial ili senĉese translokis siajn oficirojn kaj siajn diviziojn por eviti la kontaktojn, kiujn ili timis. La oftaj oficoŝanĝoj ĉe la civilaj kaj armeanaj oficistoj okazis ĉefe en la orienta Germanio, kaj oni scias, ke okazis la samo en aliaj satelitaj landoj.

En civildefenda sistemo oni ĉiam devas distingi inter gvidantoj kaj ordinaraj individuoj. Iuj Germanoj el miaj amikoj, kiuj estis malliberaj en Sovetio dum la milito, rakontis al mi, ke ili multfoje devis suferi pro terure brutala sistemo, sed ke cetere ili ricevis multajn bonfarojn el individuoj. Ili ofte trovis ĉe siaj gardistoj la senton, ke ankaŭ tiuj estis, samkiel ili, viktimoj de la reĝimo. Simila formo de solidareco povas disvolviĝi en okupata nacio. La metodoj de la perarmila rezistado emas transformi en malamikojn ĉiujn membrojn de la okupantaj fortoj, dum estas ege profitdone favorigi al si iliajn membrojn, montrante al ili amikajn sentojn. Krome, oni ne forgesu, ke ĉioma rifuzo kunlabori povas estigi suferojn por la okupata popolo. Oni ne sufiĉe taksis la gravecon de la mizero suferita de senkulpuloj pro tia rezistmaniero.

Mi jam diris, ke, laŭ germanaj generaloj, la perfortaj rezistmanieroj estas senefikaj kaj ke, krome, ili emas kontraŭi la neperfortan rezistadon. Tamen, sabotado levas interesan problemon. Ĝi staras ĉe la limo de ambaŭ

formoj de rezistado. Oni povas diri, ke estas du formoj de sabotado, la perforta kaj la neperforta. Oni konsentos, ke ŝajnas malfacile klasi en la duan kategorion la pereksplodandetruadon de pontoj kaj diversaj konstruaĵoj. Tamen, ĉu oni ne distingu laŭ la elektoj, kiuj gravis por decidi la celon kaj la momenton de la agado ? Eksplode pereigi trajnon soldatplenan, aŭ la ponton, sur kiu antaŭeniras tiu trajno, estas evidenta perfortago. Sed, se la ponto estas detruita antaŭ la transiro de la trajno, sen endanĝerigo de iu ajn homa vivo, tiam mi opinias, ke temas pri io alia.

Pri tiu temo oni povus proponi du ilustraĵojn. La unua rilatas al la Berlina krizo. Impresis min la manko de realismo de la planoj starigitaj por venigi kirasveturilojn al Berlino; kaj mi defendis ke, por ege malfaciligi la taskon al la okcidentanoj, sufiĉus al la Sovetianoj obstrukci la ŝoseon, detrui la pontojn kaj liniigi siajn trupojn sur la vidalvida riverbordo, sen pafi unufoje kaj nur restadante tie rezolute. Mi opinias, ke la aliancaj trupoj tiam morale ne povus antaŭeniri en tiaj kondiĉoj. La dua ilustraĵo koncernas la nukleajn armilojn. La uzado de la taktikaj nukleaj armiloj prezentas seriozan danĝeron de eskalado, se ili estas uzataj rekte kontraŭ la malamika armeo. Sed ni konsideru la kazon, kiam ili estus uzataj ekzemple en montara lando por bloki trairejon longtempe antaŭ la alveno de la invadanto. La risko de eskalado tiam estus for. Simile oni povus uzi la atomajn minojn. Tiaj obstrukcadoj malhelpus la rapidan realigadon de invadplano, sen estigi perdon de homvivoj, kiuj nepre rezultigus punagadon.

Forpasos longa tempo, antaŭ ol registaro konsentos konsideri la ideon de civila defendo. Dum la dua mondmilito iuj ŝtatoj agnoskis la valoron de la popola rezistado, sed tiu adoptis la perfortan formon. Kiam registaro konscias pri sia nekapablo organizi efikan militdefendon, nur tiam ĝi rigardas serioze la civilan defendon. Tial mi trovis en la skandinavaj landoj multe pli da intereso por tiuj defendsistemoj, ol en Britio, Germanio aŭ Francio.

Oni ĉiam devas ekzameni, ĉu la perarmila rezistado havas sukceseblojn en tia aŭ tiu difinita lando. Se ĝi ne estas efika, ju pli neperforta restos la rezistado, des pli efika ĝi estos. En iuj kazoj, eble estus konsil-

inde prezenti unue militan rezistadon, kaj poste, okaze de malvenko, rezolute transiri al la neperforta rezistado, taktiko, kies eco povus ege konfuzi la invadanton.

Por instigi la homojn serioze ekzameni tiun temon, ege gravas eviti konfuzon kaj malprecizon. Male, necesas plejeble klare demonstri, ke temas pri politiko realigebla, kaj ke ĝi estas pli efika ol la milita defendo.

Estus ege interese, rigore studi la civilan defendon, kion oni ĝis nun ne sufiĉe faris. Kio plej mankas por tia studo, tio estas eble detalaj raportoj pri apartaj kazoj de rezistado kaj pri la instruoj, kiujn oni povas tiri el ili.

--o--

Dua aldonaĵo :

# Socia defendo

(Intervjuo kun prof. Teodoro Ebert, Berlino).

Socia defendo estas alternativo je la milita kaj provas per senperfortaj rimedoj ("dinamika plulaboro sen kunlaboro" - Ebert-, ne-kunlaborado, alfrontaj taktikoj k.a.) decidigi la okupacian potencon retiriĝi el la okupata lando; ĉu per evidentigo al la okupantoj, ke la okupacio estas sensenca, ĉar la lando neregeblas, ĉu pro la estiĝantaj problemoj, se tro granda nombro da pliaj soldatoj kaj civiluloj devus poste klopodi por garantii la funkciadon de la lando laŭ la celoj de la okupantoj.

La socia defendo kondiĉas la preparadon de la defendaj agadoj kaj socian demokration (socia justeco, alta grado de partopreno kaj homogeneco k.a.), ĉe kio la defendopreteco ne rezultu el mobilizo de primalamikaj imagoj, sed el la propra valoro de la socia situacio.

La intervjuo kun Teodoro Ebert (profesoro pri politikaj sciencoj - pacesplorado - ĉe la Libera Universitato en Berlino kaj aŭtoro de pluraj studoj pri la teorio de la socia defendo) okazis en la somero de 1973 en Berlino.

R. Epple

Rudolf Epple-Sissach (R.E.) : - Sinjoro Ebert, kial oni serĉu novajn defendo-formojn, alternativon je la milita defendo ?

Teodoro Ebert (T.E.) : - Ni devas ĉi tie ekiri de la kritiko al militismo, kia ni konas ĝin el la historio de la antimilitismo kaj pacismo. Ĝi havas duoblan aspekton : interna kaj ekstera politikoj. Eksterapolitike, la militaj defendopreparoj kreas ĝuste plistreĉigon pro la efiko de la minaco, kaj samtempe ekbatalo plejofte detruas ĝuste tion konservendan. Depost la eltrovo de la atomarmilo kaj ĝia apliko fine de la dua mondmilito, tiu danĝero ankoraŭ kreskis. El tio sekvas, miaopinie, militstrategia devigo pripensi alternativajn rimedojn por solvi internaciajn konfliktojn.

Internapolitike, la militaj defendopreparoj ĉiam utilis al la grupoj, kiuj jam posedis regpovon, t.e., kiuj havis el socia vidpunkto konservativan karakteron. Ne laste ankaŭ tial, ĉar la armeon, kies ekziston oni pravigas eksterapolitike, oni sufiĉe ofte intervenigis en la internan politikon. Ni aldonu, ke la elspezoj por produkti armilojn konsistigas gravan faktoron en la kadro de la kapitalisma ekonomisistemo, kaj, ke tiel en la etaj ŝtatoj kiel en la grandaj povis formiĝi militindustria komplekso. Jen estus koncize resumitaj la kaŭzoj, kiuj postulas, ke oni serĉu alternativajn defendoformojn.

R.E. : - Krom la motivoj de kritiko al militismo, ĉu aliaj aspektoj menciendas ?

T.E. : - Jes, aldonendas ankoraŭ io : en la 20-a jarcento ni faris - kaj tio ŝajnas al mi nova - konstruajn spertojn de alternativaj defendoformoj. Tiel, dum la dua mondmilito, la civila rezisto ludis konsiderindan rolon, kaj ni fakte spertis - plej drame en Ĉeĥoslovakio en 1968 - ke por malgranda ŝtato (eĉ armita) ne restas serioza ŝanco por milita sindefendo kontraŭ atako de grandpotenco. La pozitivaj spertoj pri spontana civila rezisto instigas al sciencaj esploroj por ellabori koheran kaj kompletan defendoprogramon, kalkulante ankaŭ kun la sendube negativaj spertoj pri milita rezisto, kaj baziĝante sur la civila defendo de la popolo.

R.E. : - Ĉu la ĉi-rilataj pripensoj en diversaj landoj jam progresis tiom, ke oni intencas ŝanĝi la defendan politikon en proksima estonteco ?

T.E. : - Plej progresintaj estas la pripensoj en nordaj ŝtatoj, precipe en Svedio kaj Finnlando. Tie ekzistas pacistaj asocioj pledantaj por la civila rezisto kiel kompleta alternativo je la milita defendo. Tio estas : ili postulas unuflankan militan malarmadon kaj la adaptiĝon al civila rezisto. La ministerioj por defendo provas bremsi tiun movadon, dirante, ke ili mem favoran kombinadon de civila kaj milita rezistoj. Ili antaŭvidas tri-ŝtupan modelon : unue, konvencia milita rezisto, poste, gerila batalo kaj fine civila rezisto.

R.E. : - Kion vi opinias pri la kombinado de defendoformoj ?

T.E. : - Ĉi tiun modelon mi konsideras nepraktikebla en tia formo, ĉar konserviĝas ĉiuj malavantaĝaj detruaj sekvoj de la milita rezisto kaj ili efikas psikologie premaj por la posta civila rezisto. Sed mi opinias interese, ke en tiuj landoj la registaroj vidas estontan elekteblon por eventuale rezigni dekomence pri milita rezisto en reala okazo. Tion oni ne ankoraŭ rekte konfesas, tamen nerekte akceptas.

R.E. : - Ankaŭ Svisio konas plurŝtupan koncepton pri defendo.

T.E. : - La svisa koncepto pri totala rezisto ŝajnas al mi multrilate kritikinda. Unue, ĉar ne ekzistas konkreta, publike konata kaj pripensita koncepto pri la civila rezisto de la loĝantaro. La gvidlibro pri civila defendo estas troe morala alvoko kaj nesufiĉe pripensita laŭ organizaj formoj.

Ekzemple, oni ne prikonsideras la eblecojn de la laborista movado partopreni en la civila rezisto. Mi supozas, ke la aŭtoroj de la gvidlibro pri civila defendo havas plej skeptikan starpunkton rilate ĉiujn defendoformojn de la laborista movado, nome striko, bojkoto, k.s., kaj ili komprenble ne volas konfesi, ke ekzistas rilato inter la ekzercado de tiuj batalmetodoj dum internpolitikaj konfliktoj por transformi la socion unuflanke, kaj la kapablo apliki tiujn batalformojn kontraŭ eksteraj agresantoj aliflanke. Pasiva civitano, kiu certe ĉiam iras al la urnoj, sed cetere ne aktivas en demokratiaj rondoj nek manifestacias nek strikas, tiu ankaŭ ne povas per legado de la gvidlibro pri civila defendo plenumi efikan civilrezistadon kontraŭ agresanto. Se oni volas civilan rezistadon kiel alian eblecon aŭ kiel kompletigon al milita defendo, tiam oni devas jam hodiaŭ esti preta aprobi ĉi tiujn batalmetodojn en la ĉiutaga vivo de Svisio.

- R.E. : - Por reveni al la progresinta diskuto en skandinavaj landoj : kiel vi klarigas, ke la diskuto jam tiom konsiderinde evoluis en tiuj landoj ?

- T.E. : - Estas aro da kaŭzoj : unu el la plej gravaj estas la sperto pri okupacio en la dua mondmilito, kiam oni ja aplikis ĉi tiun civilan rezistadon kontraŭ la germana okupacia potenco, aŭ povis ĝin rekte observi en

Svedio ĉe la dana kaj norvega najbaroj. Krome, la scienca pacesplorado relative evoluinta en tiuj landoj reflektis teorie la praktikajn spertojn. Fine aldoniĝas, ke la malgrandaj landoj taksas siajn militajn defendoŝancojn relative realisme kaj ke ili havas ĉiam malpli da eblecoj sekvi la paŝojn de la moderna armilevoluo kaj tial serĉas aliajn eblecojn aŭ kompletigojn.

R.E. : - Kio estas la kaŭzo de la relative neprogresinta diskuto pri la socia defendo en Svisio ?

T. E. : - Ankaŭ en Svisio ekzistas certa intereso por la civila rezisto kiel rimedo de defenda politikô. Sed la Svisoj ŝajnas al mi vere - se mi rajtas argumenti agreseme - la lastaj naivaj militaristoj en Eŭropo kaj fidi iom naive je sia milicosistemo kaj ties defenda metodo. Mi opinias, ke estus tre utile, se oni foje pripensus la "se-kazo"n kaj sin demandus, kio okazintus, se la Akŝaj potencoj Italio kaj Germanio gajnintus la militon. Ĉu tiam ne estus ĉesinta la milita rezisto dekomence kaj restinta al la svisoj nur la civila rezisto ? Postevente mi konsideras unu el la plej gravaj neglektoj de Svisio dum la dua mondmilito, ke oni nesufiĉe pripensis la civilan aspekton de la rezistado kontraŭ la naziismo. Mi ne volas nei, ke la milita armado de Svisio havis certan avertefikon sur la hitlera Germanio, sed ĝia graveco estis limigita. Laŭ mia opinio, se mi nun parolas pri la estonteco, la preparado de civila rezistado nepre havas kompareblan avertefikon. Krome ĝi donas al la registaro multe pli da ageblojn. Ĝi ne estas - kiel estus multrilate milita defendo de Svisio - anonco, ke oni pretas por demonstracia sinmortigo, sed ĝi prezentas flekseblan respondon. Por ĉiu agresoformo de la kontraŭulo la registaro povas serĉi konvenan respondon kaj laŭ la cirkonstancoj elteni dum jaroj kaj jardekoj. Tio ne estas la strategio "ĉio aŭ nenio", kaj tial ĝi ŝajnas al mi pli pragmata. Mi opinias - klare dirite - nerespondeca la registaron de malgranda neŭtrala ŝtato, kiu ignoras ĉi tiun alternativon aŭ konsideras ĝin nura kompletigo de la milita defendo.

R.E. : - En kio vi vidas la specialan signifon de neŭtralaj ŝtatoj rilate alie armitan Eŭropon ?

- T.E. : - Se vi parolas pri alie armita Eŭropo, temas kompreneble pri estonta perspektivo, kiu enhavas evoluan procezon, kaj la demando estas nun : kie komenciĝas ĉi tiu procezo de truporeduktoj kaj unuflanka malarmado ? Mi povus imagi, ke la unuflanka malarmado de malgranda neŭtrala ŝtato, ekzemple Aŭstrio, kaj la adaptiĝo al civila rezistado povus kaŭzi imitefikon aŭ unue "aha"-efikon. Ĉar mi diras tion, oni okaze riproĉis, ke mi volas eksperimentigi la malgrandajn neŭtralajn ŝtatojn kiel kobajojn. Sed, ĉar mi opinias, ke tiu eksperimento finiĝos por la bono de tiuj ŝtatoj kaj mi kiel aŭstro donus la saman rekomendon, mi do povas pledi por mia konsilo, ke neŭtralaj ŝtatoj rolu kiel avangardo. Fine tamen gravas, ke la membro-ŝtatoj de militaj blokoj entreprenu tiun paŝon kaj por tio oni devas labori per ekstremaj fortostreĉoj. Ekzistas en Danio, en Nederlando kaj en Germana Federacia Respubliko grupiĝoj strebantaj al tiu celo. Iliaj strebadoj plifortiĝus, se neŭtralaj ŝtatoj rolus la avangardon.

- R.E. : - Ĉu vi vidas specialan signifon por Svisio en tiu grupo de neŭtralaj ŝtatoj ?

- T.E. : - La ĉefa signifo de Svisio nuntempe estas, ke ĝi plenumas treegan bremsfunkcion rilate la diskuton de la socia defendo. Se Aŭstrio entreprenas paŝojn por redukti la soldatdevigon aŭ cele al malarmado, svisaj militistoj alarmas kaj vidas minacon. Mi ne atendas, ke Svisio entreprenu avangardan funkcion en tiu direkto, sed mi tamen trovus utile, se en Svisio la voĉoj, kiuj pledas por socia defendo, plimultiĝus kaj konsistigus kontraŭpezon al la konservativaj fortoj kaj nuligus ties bremsfunkcion. Rilate konstruon de teorioj kaj modelajn eksperimentojn, mi atendas multon de la svisoj. Ekzistas en Svisio longa tradicio de pensado pri strategio kaj defenda politiko. Tio validas eĉ por la svisaj militrifuzantoj. Ili estas pli informitaj pri strategiaj demandoj ol iliaj kolegoj en aliaj neŭtralaj ŝtatoj. Ĉi tiun tradicion oni povus ekspluati ankaŭ por defenda politiko senarmila.

R.E. : - Kiuj estus la ĉeftaskoj de pacistaj grupoj en Svisio rilate la socian defendon ?

T.E. : - Mi opinias, ke la pacistaj grupoj en Svisio ĝuste laboris dum la lastaj jaroj per sia antimilitisma

klerigo, per sia kritiko al la svisa produktado kaj eksportado de armiloj, per la kritiko al la milita dresado k.s.. Ĉiuj ĉi elementoj konserviĝu. Sed ili estas negacioj, kaj kio ŝajnas al mi grava, tio estas, ke la pacistaj asocioj en Svisio evoluigu konstruan alternativprogramon, kiu ne nur konsistu en alternativa defendpolitiko, sed ankaŭ atentu, ke la socia defendo aŭ la civila rezisto povas funkcii nur, se efektiviĝas socia procezo celanta pli da demokrateco, pli da partopreno, pli da socia justeco, pli da ekonomia egaleco. La konekso inter neperfortaj agadoj kontraŭ tio establita kaj por demokratigo de la socio unuflanke, kaj la preteco por civila rezisto kontraŭ intervenoj aliflanke, klare vidiĝu. La espero je rezistpreteco de la popolo deduktеblas nur el movado de rekta engaĝiĝo per civitanaj iniciatoj, strikagadoj, k.s. Mi kredas, ke la pacistaj asocioj ne povas permesi al si socipolitikan izolecon. Oni ne povas esti kvazaŭ nura antimilitisto. Oni devas enfiksi sian engaĝiĝon en ĝeneralan engaĝiĝon por pli da demokratio.

R.E. : - Kiujn konkretajn agadojn entreprenu la pacistaj asocioj rilate la socian defendon ?

T.E. : - En la pacistaj organizoj de Svisio ekzistas ankoraŭ certa deficito de informoj koncerne la koncepton de senperforta solvado de interna- kaj eksterapolitikaj konfliktoj, kaj ĝuste speciale de la socia defendo. Mi konsiderus grave, ke formiĝu laborgrupo, kiu pristudus la internacian situacion de esploroj kaj spertoj, kaj kompilus informbroŝuron. Ĉi tiu grupo serĉu kunlaboron kun same interesitaj grupoj en la partioj, speciale en la socialista, kiuj montris intereson por tiu koncepto, kaj ankaŭ kun konfesiaj grupiĝoj.
La posta paŝo estus ellaboro de konkretaj proponoj : kion povas signifi socia defendo en Svisio; kiuj probablaj konfliktoj estas imageblaj kaj kion oni devus konkludi por la civila rezisto el la konfliktospertoj pli frue kolektitaj ? Tiun paŝon oni devus diskonigi kaj ĉi-rilate mi opinius oportuna konstruivan kritikon - sed finefike kredeble neniigan - al la civildefenda gvidlibro, kiu tion ne plenumas. La Internacio de Militrezistantoj foje pripensu, ĉu oni ne ellaboru kiel alternativon je la civildefenda libro gvidilon por rektaj agadoj de civitanoj por interna- kaj eksterapolitikaj konfliktoj.

Tria aldonaĵo

Jena letero, adresita al Ministro pri nacia defendo, akompanis la soldatlibretojn de siaj subskribintoj. Dekoj da personoj, en Francio, jam efektivigis tiun geston pri civila malobeado, pro kiu ili riskas fortan monpunon, senigadon je siaj civitanaj rajtoj kaj enkarcerigon. Ili povis, sin riskante al tio, efektivigi ĉirkaŭ si, vastan informadon pri neperforto.

Sinjoro Ministro,

Ĉar vi respondecas pri la sorto de nacio, ni komprenas, ke vi deziras gardi bonstata la estimon, kiun oni devas al armeo, sola garantianto, laŭ multaj, pri komuna sekureco.

Tamen, oni ebligu al aliaj civitanoj konsideri alimaniere la problemon. Ĉar, nuntempe, la armeo povas nenion por prirespondi la konfliktojn kaj la antagonismojn, kiuj, funde, estas alispecaj ol tiuj de la pasinta tempo.

Sur tiu kampo, same kiel sur tiom da aliaj, oni devas peni pripense kaj image, por trovi rimedojn, samtempe efikajn kaj indajn je homo, pri rezistado kontraŭ atako aŭ maljusto.

Tiaj rimedoj ekzistas. Ilin eksperimentis Gandhi ekde la fino de la 19a jarcento, kaj estas eble opinii, ke, kio estis, origine, eventoj lokaj kaj nekutimaj, ligitaj al geniulo, tio devas iĝi normalaĵo, se oni deziras eviti, ke nukleaj armiloj iam solvos, absurde, niajn debatojn kaj konfliktojn. Kiu, funde de si mem, estas sufiĉe naiva por kredi, ke la minacado estos ĉiama kaj ke tiuj teruregaj armiloj ne estos uzataj, kiam ili estos haveblaj de iu ajn?

Estas do por atentigi vin pri la devo, kiun verŝajne ni ĉiuj havas - kaj vi mem speciale - studi novajn metodojn pri rezistado al atako, ke ni resendas al vi niajn soldatlibretojn : ne serĉi alternativon al armeo kaj armilaro estas, nuntempe, akcepti la fatalecon de la milito. Nu, estas devo, por ĉiu homo, reagi kontraŭ tiu fataleco, eĉ koste de sia propra vivo; koncerne nin, ni deziras esti modestaj kaj decidemaj atestantoj pri tiu reago.

Povas esti reala risko, kiam oni rigardas kiel ebla defendmetodon bazitan sur preparado al nekunlaborado kun invadanto. Sed ĉu tiu risko estas pli granda, ol tiu alia,

prepari atoman militon kaj do trasuferi ĝin. Ni estas alpremitaj al ia saĝeco, eĉ se ni opinias, ke la homoj ne kapablas ĝin. Sed kiel ili kapabliĝus pri ĝi, se la ŝtatrespondeculoj, laŭ tro malvasta filozofio, enfermiĝus en eksvalidaj pensmaniero kaj konduto ?

Ŝajnas profunde nelogike, nenormale kaj nemorale, ke la franca registaro sisteme malkonsentas studi aliajn defendmetodojn ol militpreparadon, kiam la genio de nia nacio estas eble, ke ĝi iniciatu tian serĉadon. Ne estas certe, Sinjoro Ministro, ke via patriotismo estas pli klera ol la nia.

Ni do resendas al vi niajn soldatlibretojn, plenakorde kun la Larzak-kamparanoj, viktimoj de politiko pri nacia defendado, laŭ ni, senprofunda kaj sensaĝa, esperante, ke eble vi bonvolos priatenti tiun leteron.

Bonvolu kredi, Sinjoro Ministro, pri niaj respektemaj sentoj,

Georges Berthoneau, pensiulo.
René Macaire, psikologo.
Pierre Roy, bovisto.
Jean-Marc Godard, kultivisto.
Michel Pénisson, instruisto.

Kvara aldonaĵo

Eksiĝletero de ŝip-leŭtenanto Gérard MILLISCHER, adresita al la Ministro pri defendo.

Pro miaj propraj konvinkoj, mi petas, ke vi bonvolu akcepti mian eksiĝon.

Miaj motivoj konsistas el kontestado al nia defend-sistemo, kun esence konkreta propono : la neperforta civila defendo; la prezentado de mia eksiĝo estas ligita kun la publikigo de la ĉi-kuna broŝureto "Ĉu armeo aŭ civila neperforta defendo?", kies kunsubskribinto mi estas, kaj kiun mi aŭdacas submeti al via ekzameno.

Mia klopodo venas el konstato : la malsaĝeco de nia nuna pridefenda politiko. Bazita sur strategio de nuklea kontraŭurba minaco, tiu politiko kondukas do konsideri tutajn popolojn kiel ostaĝojn minacatajn de tuta detruado; krome, ĝi entenas la neakcepteblan eventualon pri kolektiva memmortigo okaze de fiasko de la minaco. La absurdeco de tiu principo kaj la multnombraj politikaj, ekonomiaj kaj ekologiaj maloportunaĵoj de tiu strategio povus esti, en ekstrema okazo, konsiderataj kiel "plej malgranda malbono", se tiu ĉi perfekte certigus la sekurecon de la teritorioj kaj de la popoloj. Nu, oni povas serioze dubi pri tio, ĉefe rilate al konsekvencoj, kiujn tia politiko estigas : necesa profitdoneco, tial armilvendado al alilandoj kaj kreskado de la konfliktofteco, vetarmado kaj disvastigo de nukleaj armiloj, tial pligraviĝo de la militriskoj.

Instrumento de nia pridefenda politiko, la milita institucio mem, kiu nun eltenas gravan krizon, ankaŭ ĝi devas esti ree pridiskutita : vertikala organizaĵo, kun rigida hierarkio kaj truda disciplino, ĝi permesas nur ŝajnajn respondecojn kaj iniciatojn, kaj similas al speco de paternalismo ne ebliganta, ke la individuoj evoluu aŭ sinregadu. Submetita al specifa reglamento, kiu limigas la uzadon de liaj civitanaj rajtoj, la militisto ne obeas la komunan leĝon. Pro tio la armeo iĝas aparta mondo, starigita kvazaŭ absoluta; ĝi ĉerpas sian vivkialon el si mem kaj ne el la nacia servo; kaj, ne plu servante la nacion, ĝi servas la regantan politikan potencon.

Fronte al tia milita politiko, kiu certe entenas sian koherecon kaj sian internan logikon, sed kies rimedoj ne ŝajnas al mi kapablaj atingi la celon, kiun ĝi fiksis al si,

kaj konsiderante, ke popolo rajtas kaj devas defendi sian vivon, sian liberon kaj siajn rajtojn, mi devis pridemandi min. En la neperforto mi trovis respondon, tiel pri la homaj interrilatoj, kiel pri la problemo de la defendo.

La neperforton karakterizas ne rifuzsinteno, sed la volo anstataŭigi la perforton,kiel agmetodon, per rimedoj akordigeblaj kun homrespekto. En la uzado de "kontraŭ-perforto" fronte al atako, estas speco de kompliceco kun la agresanto : la fakto, ke oni uzas la samajn armilojn kaj la samajn rimedojn kiel li, signifas, ke oni partoprenas lian agfilozofion kaj, fine, lian koncepton pri homa libero. La ĉi-kuna studaĵo, apogita per historiaj ekzemploj, montras, kia povus esti neperforta defendo, transprenita de popolo kun ĉiuj rimedoj, kiujn proponas la nekunlaborado kaj civila malobeado, ĝiajn avantaĝojn super armita defendo, ĝian efikecon, la problemojn starigitajn pro ĝia instalado kaj nome la neceson de politika transformiĝo, direkte al malcentralizado sur ĉiuj kampoj. Unu el la ĉefaj kialoj, kiuj decidigas min, estas la konvinko, antaŭ neevitebla kunĉenado de la perforto kaj ĝia nekapablo funde finaranĝi la konfliktojn, ke, per rifuzo de ĉia kunlaborado kun invadanto kaj per la rimedoj de aktiva neperforto, oni povas starigi veran defendstrategion kaj konsistigi veran minacforton.

Se miaj konvinkoj kondukas min al eksiĝo kaj al publikigo de tiu letero kiel atestilo en la ĉi-kuna studaĵo, mi tion faras sen la pretendo juĝi aŭ kondamni iujn ajn, speciale la militistojn mem.

Je la momento de la diskutoj pri nia nacia defendo, de la "armea konfuziĝo", kiun oni ne povas nei, ĉu ne temas pri funda problemo : tiu de la celo kaj de la rimedoj ? Eble la neperforto alportas al ĝi respondon.

Gérard Millischer

# BIBLIOGRAFIO


## En Esperanto

THOREAU (Henry-David): Civila Malobeemo - Laroque-Timbaut, La Juna Penso, 1976 (broŝura serio, 108B)

## En angla lingvo

BELL (R.G.): Alternative to war - Londono, Clarke.
BRADFORD (L.): National defence, the non-violent resistance - Chicago, 1958.
GANDHI (M.K.): All men are brothers - Columbia University Press, 1959, 196 p.
KING (Martin Luther): Stride toward freedom : the Montgomery story - Washington, Harper, 1958, 230 p.
KING (Martin Luther) : Why we can't wait - Washington, Harper; Don Mills (Ontario) : Longmqns, 1964, 178 p.
KING HALL (S.) : Defence in the nuclear age - London, Gollancz, 1958.
ROBERTS (A.): The strategy of civilian defence (Non violent resistance to agression) - Faber and Faber, 1967, 320 p.

## kaj ankaù (°)

- la originalo de la verko de H.D.Thoreau pri civila malobeemo;
- la originalo de la studo de G. Sharp pri la neperforta rezistado en Norvegio dum la nazia okupado (eble artikolo de Peace News).

## En franca lingvo — libroj kaj broŝuroj

GANDHI (M.K.): Tous les hommes sont frères - Gallimard, 1969, (collection Idées n° 200), 314 p.
KING (M.L.): Révolution non-violente - Paris, Payot, 1965,198p
KING (M.L.): Combats pour la liberté - Paris, Payot, 1969,244p
LANZA DEL VASTO : Le Pélerinage aux sources - Denoël, 1943, (Livre de poche n° 12).
LANZA DEL VASTO : Technique de la non-violence - Paris,Denoël, 1971, 243 p.
LASSERRE (J.): Les Chrétiens et la violence - Paris, Ed. de la Réconciliation, 1965.
MULLER (Jean-Marie) : Stratégie de l'action non-violente - Fayard, 1972, 267 p.

NEISH (J.M.) : Le Combat de Danilo Dolci - Paris, Stock, 1965, 280 p.
OPPENHEIMER (M) kaj LAKEY (C): Manuel d'action directe - Extraits publiés par le Mouvement International de la Réconciliation, rue Van-Elewijck, 35, Bruxelles.1050.
PYRONNET (J): Une nouvelle force de frappe : l'action non-violente - Ed. Témoignage chrétien, 1965, 172 p.
THOREAU : La Désobéissance civile - Paris, Pauvert, 1968.
TOULAT (J): La Bombe ou la vie - Paris, Fayard, 1970, 200p.
TOULAT (J) : Les Grévistes de la guerre - Paris, Fayard, 1971, 212p.
SHARP (G) : Résistance non-violente en Norvège sous l'occupation nazie (hektografita studo, traduko de P. Sempé - eldonita de : Communauté non-violente d'Orléans, 50 rue d'Illiers, 45000 Orléans)

<u>gazetoj</u>

<u>Combat non-violent</u>, monata informilo pri la neperforta agado en Francio kaj en la mondo, Boîte postale 26, 71800 La Clayette (abono : 30 FF)
<u>Alternatives non-violentes</u>, revuo de esplorado kaj pripensado, 22 rue de l'Eglise, 69003 Lyon (abono : 25 FF)

<u>En germana lingvo</u>

EBERT (T) : Gewaltfreier Aufstand : Alternative zum Bürgerkrieg - Frankfurt,Hamburg , Fischer Bücherei, 1970.
EBERT (T) : Wehrpolitik ohne Waffen : Vom passiven Widerstand zur sozialen Verteidigung - Opladen, Argus Verlag, 1972.

-------

(°) La tradukintino pardonpetas, sed ŝi estas ankoraŭ nur tre novica subbibliotekistino, kaj ne sukcesis retrovi la referencojn de ĉiuj libroj, pri kiuj la verkintoj citis nur la franclingvajn tradukojn. Legantoj, kiuj serĉas la originalojn, bonvolu turni sin al pli kompetentaj kolegoj kun pli dikaj registrolibroj de anglalingvaj verkoj.

Traduko de la franclingva flugfolio, verkita por ebligi al la legantoj partopreni en la diskonigado de la franclingva broŝuro.

## ĈU ARMEO, AŬ CIVILA NEPERFORTA DEFENDO ?

Defendo necesas, sed ĉu la armeo vere defendas nin ?

La efikeco de la perarmila defendo restas pruvota. El kvin perarmilaj agresadoj, kiujn Francio suferis ekde 1800, oni ne povas citi eĉ unu kazon, kiam la perarmila defendo sukcesis forpeli la agreson sen provoki amasbuĉadon en la landanaro (1 390 000 mortintoj kaj 740 000 invalidoj en 1914-1918).

Al ĝia dubinda efikeco aldoniĝas ega pasivo : tutmonda vetarmado, ekstravagancaj elspezoj, kiuj malebligas solvi la verajn problemojn, multiĝado de la lokaj militoj, kreskanta risko de monda nuklea milito pro la disvastigado de la atomarmiloj, risko, kiel ofte okazas (Biafrio, Pakistano, Ĉilio, ktp), ke la armeo turnos sin kontraŭ la popolo, kiun ĝi supoze defendas. (Ni ne volas fari ĉi tie sendetalan kontraŭmilitismon : multaj armeanoj, tion ni scias, rifuzus esti uzataj kontraŭ la landanaro; sed ni scias ankaŭ, ke ekde kiam ekfunkcias la milita maŝino, ne multe efikas la individuaj voloj de tiuj, kiuj konsistigas ĝin).

Ĉu eblas nur la perarmila defendo ?

Plurfoje, en la historio, popoloj defendis sian vivon kaj siajn rajtojn sen armiloj, per la nuraj rimedoj de la aktiva neperforto (nekunlaborado, civila malobeemo, civila obstrukco). Kaj ili ofte protektis sin per tiuj rimedoj pli bone ol aliaj per armiloj.

Tiel, dum la dua mondmilito, kiam ĉie la judoj estis amase deportataj kaj masakrataj, la nuraj okupitaj landoj, kie la nazioj renkontis efikan rezistadon, estas Danio kaj Bulgario, kie la landanaro elektis la neperfortan rezistadon. La germanaj generaloj mem agnoskis tion. En la unua lando, nur 48 judoj el 7800 mortis ĉe la deportado, en la dua, la nazioj povis deporti neniun judon.

En Norvegio, sub la kunlabora registaro starigita de la Germanoj, la neperforta rezistado de la instruistoj malebligis al la okupantoj realigi la edukan sistemon,

kiun ili decidis starigi.

Per amasa neperforta rezistado gvidata de Gandhi, Hindio estis la unua lando malkoloniita post la dua mondmilito.

Per kampanjoj de neperforta agado, Martin-Luther King ekmovis la usonajn nigrulojn kaj ebligis al ili ekhavi la civitanajn rajtojn.

Nuntempe en Kalifornio, per neperfortaj rimedoj Cesar Chavez kaj la meksikianaj laboristoj sukcese kontraŭstaras la ĉiopovajn kaliforniajn agrikulturajn trustojn.

En Sovetio, per neperfortaj rimedoj la judoj ekhavis la rajton elmigri al Izraelio.

En Francio, per neperfortaj rimedoj la kamparanoj de Larzako malebligas sian elpeladon kaj la steriligadon de sia grundo kaj naskas ĉirkaŭ si neantaŭviditan solidaron.

<u>Ĉu perarmila defendo aŭ neperforta defendo</u> ?

<u>Stariĝas la demando</u>.

Ĉu ni ne estus pli bone defendataj, mem transprenante la taskon de nia propra defendo per la rimedoj de aktiva neperforto, kiu ebligus al ni lukti efike, kaj konstante respektante la personojn, kontraŭ alilanda agreso tiel bone kiel kontraŭ enlanda diktaturo ? Pri tia temo, ne multe probablas, ke la televido liverosal vi objektivan informadon.

Ĵus realiĝis kolektiva verko pri la neperforta defendo (inter la subskribintoj : Lanza del Vasto, Jean Toulat, generalo de Bollardière). Post kritiko al la armeo kaj al la diversaj formoj de defendo, kiujn ĝi uzas, tiu studo montras per precizaj ekzemploj tion, kio povus esti neperforta defendo memgvidata de la landanaro. Tia sistemo certe necesigus gravan politikan malblokadon. Sed ĝia progresiva adoptado far la landanaro ankaŭ povus favori tiun malblokadon, donante al ni verajn agrimedojn kontroleblajn de la bazo, kaj do verajn povojn.

Tiu studo aperis kun la titolo : "Armée ou défense civile non-violente?". Vi povas akiri ĝin plenskribante kaj sendante la ĉi-suban mendilon. (La verkintoj de tiu libro ne ricevas verkrajtojn). Por kontakti loke personojn interesatajn per tiu problemo, turnu vin al : ......

-------

<u>Notoj</u> : La franclingva flugfolio (21x29,7) kostas 7 FF po 100
La franclingva broŝuro kostas 8 FF (kun sendkostoj).Ambaŭ haveblas ĉe: C.L.I.C.A.N., 15 av. Vauban, F 83100 Toulon
Eblas pagi per francaj PM, ĉeko, ĝiro al CLICAN 2-902-67 Marseille.

# E N H A V O


Averto al la leganto ... 3

Antaŭparolo .. 5

Ĉapitro 1 : Pridiskutado de la nacia defendo
- el politika vidpunkto ... 9
- el ekonomia vidpunkto .. 12
- el ekologia vidpunkto .. 13
- el morala kaj religia vidpunkto.. 15

Ĉapitro 2 : Ĉu perarmila defendo estas efika ?
- la tradicia milita defendo .. 19
- la nuklea defendo .. 23
- la popola perarmila defendo .. 27

Ĉapitro 3 : La civila neperforta defendo
- teknikoj pri neperforta lukto .. 34
- skizo de kampanjo de civila neperforta defendo .. 41
  a) dum la invado .. 41
  b) dum la milita okupado .. 43
  c) post la milita okupado .. 51
- necesaj kondiĉoj .. 52

Konkludo .. 57

Unua aldonaĵo: La civila rezistado (Sir Basil Liddle Hart) .. 64

Dua aldonaĵo : Socia defendo (Teodoro Ebert) .. 71

Tria aldonaĵo: Letero al la ministro de nacia defendo .. 77

Kvara aldonaĵo: Eksiĝletero de ŝip-leŭtenanto Gérard Millischer .. 79

Bibliografio .. 81

Traduko de flugfolio .. 83


---


Gérant & imprimeur: Baudé, 47340 Laroque